

eLIBRO

*La libro, kiun mi nun estas verkanta, devas ŝajni sensenca al multaj — se mi entute kuraĝas imagi, ke "multaj" rajtos legi ĝin — ĉar mi tute memstare, sen ies ordono, komencas tian laboron kaj tamen mem ne komprenas, kio estas ĝia intenco. Mi volas kaj devas, tio estas ĉio. **Uzino 1***



INKO

UZINO 1

*Elektronika revuo de originala
kaj tradukita beletro*

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-173-9

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

OKTOBRO 2002

Enhavo

| | |
|---|----|
| Pri Uzino | 4 |
| Kallokaino (<i>Karin Boye</i>) | 5 |
| Panpeco kun Anna (<i>Herta Wirén</i>) | 14 |
| Singoalla (<i>Viktor Rydberg</i>) | 21 |
| La nazo (<i>Franko Luin</i>) | 26 |
| La lasta Kristnasko de mia patro (<i>Olle Lindgren</i>) | 36 |
| Sinjoro kapitano (<i>Ivan Cankar</i>) | 44 |
| Kamaradoj (<i>Viktoria Benedictsson</i>) | 49 |
| La puphejmo (<i>August Strindberg</i>) | 72 |
| Ĉu ekzistas anĝeloj? (<i>Einar Åberg</i>) | 99 |

Pri Uzino

Uzino estas interreta revuo en formato de eLibro. En ĝi aperas prozaj beletraj tekstoj, originalaj kaj tradukitaj. Kiel oni povas diveni el la nomo, ofte povas temi pri tekstoj daŭre prilaborataj, ĉapitroj el tradukataj romanoj, unuopaj noveloj, pli-malpli pretaj skizoj. Iujn oni povas trovi en alia formo en la interreto, aliaj aperas ĉi tie por la unua fojo. Ankaŭ tekstoj jam aperintaj en disaj gazetoj, sed malmulte konataj, povas trovi lokon en Uzino.

Ĉiu Uzino — la intenco estas, ke aperu pliaj — estos proksimume 100-paĝa. Aŭtoroj, kiuj havas ion publikigindan povas sendi sian verk(er)on al uzino@omnibus.se.

Oni povas uzi ĉi tiun interretan medion por vekti la intereson de la legontoj, prezentante rakonton, novelon aŭ ĉapitron el originala aŭ tradukata romano, kies publikigo kuŝas en la fora estonteco.

Franko Luin

Kallokaino

La libro, kiun mi nun estas verkanta, devas ŝajni sen-senca al multaj — se mi entute kuraĝas imagi, ke ”multaj” rajtos legi ĝin — ĉar mi tute memstare, sen ies ordono, komencas tian laboron kaj tamen mem ne komprenas, kio estas ĝia intenco. Mi volas kaj devas, tio estas ĉio. Pli kaj pli senindulge oni postulas intencitecon kaj planitecon en tio, kio estas farata kaj dirata, tiel ke prefere eĉ vorto ne falu senplane — nur la verkanto de ĉi tiu libro deviĝis iri la malan vojon, en la neintencitecon. Ĉar kvankam miaj jaroj ĉi tie kiel malliberulo kaj kemiisto — ili devas esti pli ol dudek, mi kredas — estis tamen plenaj je laboro kaj urĝo, devas ekzisti io, kio opinias, ke tio sufiĉas kaj kio gvidis kaj superrigardis alian laboron interne de mi, kiun mi mem ne havis eblecon superrigardi kaj en kiu mi tamen estis profunde kaj preskaŭ dolorige kuninteresita. Tiu laboro estos finita, kiam mi estos skribinta mian libron. Mi komprenas, do, kiel malsaĝaj miaj skribaĵoj devas ŝajni rilate al racia kaj praktika pensado, sed mi tamen skribas.

Eble mi ne kuraĝus fari tion pli frue. Eble eĉ estas la mallibereco, kiu igis min facilanima. Miaj vivkondiĉoj nun diferencas tre malmulte de tiuj, laŭ kiuj mi vivis kiel libera homo. La manĝaĵo montriĝis esti apenaŭ rimarkeble pli malbona ĉi tie — al tio mi kutimiĝis. La kuŝbretto montriĝis esti iom pli malmola ol mia lito hejme en Kemiurbo nro 4 — al tio mi kutimiĝis. Mi iom pli malofte eliras en la liberan aeron — al tio mi kutimiĝis. Plej sentiĝis la disiĝo de mia edzino kaj miaj infanoj, speciale ĉar mi nenion sciis nek scias pri ilia sorto; tio igis miajn unuajn jarojn en mallibero plenaj je maltrankvilo kaj angoro. Sed kun la paso de la tempo mi komencis senti min pli trankvila ol antaŭe kaj eĉ ekŝatis pli kaj pli mian estadon. Ĉi tie mi ne havis kaŭzon esti maltrankvila. Mi nek havis subulojn nek estrojn — se mi ne pensas pri la malliberejaj gardistoj, kiuj malofte ĝenis mian laboron kaj nur zorgis, ke mi sekvu la ordoregulojn. Mi havis nek protektantojn nek konkurantojn. La sciencistoj, kun kiuj oni kelkfoje renkontigis min, por ke mi povu sekvi la novaĵojn sur la kemia kampo, traktis min ĝentile kaj fakece, eĉ se iom superece pro mia fremda nacieco. Mi sciis, ke neniu opinias min enviinda. Mallonge: iamaniere mi povis senti min pli libera ol en libero. Sed samtempe kun la kvieto kreskis en mi ankaŭ ĉi tiu stranga laboro pri la pasinteco, kaj nun mi ne sentos trankvilon, antaŭ ol mi estos skribinta miajn memorojn

pri enhavoriĉa tempo en mia vivo. Eblecon skribi oni donis al mi pro mia scienca laboro, kaj oni kontrolas nur en la momento, kiam mi transdonas pretan verkon. Mi povas do oferi al mi mem ĉi tiun solan amuzon, eĉ se tio estos la lasta afero, kiun mi havos eblecon fari.

Je la tempo, kiam komenciĝas mia rakonto, mi proksimiĝis al la kvardekaj jaroj. Se mi cetere devas prezenti min, mi eble rakontu, laŭ kiu bildo mi imagis al mi la vivon. Ekzistas malmultaj aferoj, kiuj diras pli pri iu ol ties bildo pri la vivo: ĉu oni vidas ĝin kiel vojon, kiel batakampon, kiel kreskantan arbon aŭ ondantan maron. Mi mem vidis ĝin per okuloj de naiva lerneĵano kiel ŝtuparon, laŭ kiu oni rapidas de ŝtupo al stupo kiel eble plej rapide, kun anhela spiro kaj konkurantoj je la kalkano. En la vero mi ne havis multajn konkurantojn. Plej multaj el miaj laborkamaradoj en la laboratorio dediĉis sian tutan gloravidon al la militista kampo kaj pritraktis la taglaboron kiel tedan, sed necesan interrompon de la vespera militservado. Mi mem apenaŭ kuraĝus konfesi al iu el ili, kiom pli mi interesiĝas pri mia kemio ol pri mia militservado, kvankam mi vere ne estis malbona soldato. Ĉiukaze, mi ĉaskuris en mia ŝtuparo. Kiom da ŝtupoj oni fakte devas posthavi, tion mi neniam pripensis, kaj ankaŭ ne, kiaj logaĵoj povas troviĝi en la subtegmentejo. Eble mi nebule imagis al mi la vivodomon kiel kutiman urban domon, kie oni supreniris el la inter-

no de la tero kaj fine eliris sur la tegmentan terason, en la liberan aeron, en venton kaj taglumon.

Al kio vento kaj taglumo egalulo en mia vivomigrado, mi ne klare sciis. Sed certe estis, ke ĉiun novan ŝtupon simbolis mallongaj oficialaj informoj de supre: pasita ekzameno, akceptita provo, translokigo al pli grava laborkampoj. Mi ja havis tutan vicon da tiaj gravegaj finaj kaj komencaj punktoj malantaŭ mi, sed ne tiom da ili, ke unu plia estus sensignifa. Pro tio mi revenis kun iu grado da febro en la sango de la mallonga telefona voko, kiu informis, ke mi povos atendi mian kontrolestron la postan tagon kaj ke mi do povos ekeksperimenti per homa materialo. Morgaŭ do venos la fina fajroprovo por mia ĝis nun plej granda malkovro.

Mi estisa tiel ekscitita, ke estis malfacile al mi komencio novan dum la dek minutoj, kiuj restis de la labortempo. Anstataŭe mi fuŝfaretis — mi preskaŭ kredas, ke por la unua fojo en mia vivo — kaj metis flanken la aparatojn tro frue, malrapide kaj zorge, dum mi kaŝrigardis tra la fenestraj vandoj je ambaŭ flankoj por vidi, ĉu iu atentis min. Tuj, kiam la sonorilo signalis, ke la laboro estas finita por hodiaŭ, mi rapidis eksteren tra la longaj laboratoriaj koridoroj, kiel unu el la unuaj en la fluo. Mi rapide duŝis min, ŝanĝis la laborvestojn al libertempa uniformo, enkuris la elevatoran lifton kaj post kelkaj minutoj staris supre sur la strato. Ĉar ni ricevis loĝejon en

mia labordistrikto, mi havis superteran permeson tie, kaj mi ĝuis, ke mi povas streĉi min en la libera aero.

Kiam mi preterpasis la metrostacion, mi ekpensis, ke mi povas atendi Lindan. Ĉar mi estis tiel frua, ŝi certe ankoraŭ ne atingis hejmen de sia nutraĵfabriko iom pli ol dudek minutojn for de tie per la metroo. Unu trajno estis ĵus alveninta, kaj homrivero elverŝiĝis el la tero, premiĝis tra la bariloj, kie oni kontrolis la superterajn permesojn, kaj disiĝis tra la ĉirkaŭaj stratoj. Super la nun malplenaj tegmentaj terasoj, super ĉiuj kunrulitaj ŝtongrizaj kaj herbejverdaj gudrotukoj, kiuj povis en dek minutoj fari la urbon nevidebla de la aero, mi rigardis la tutan svarmantan aron da hejmenirantaj kunsoldatoj en libertempa uniformo, kaj subite frapis min, ke eble ili ĉiuj havas la saman revon: la revon pri la vojo supren.

La penso kaptis min. Mi sciis, ke pli frue, dum la civilisma epoko, oni devis logi la homojn al laboro kaj streĉo per espero je pli vasta loĝejo, pli bongusta manĝo kaj pli belaj vestaĵoj. Nuntempe nenio tia estis bezonata. La norma loĝejo — unu ĉambro por la fraŭlaj, du por familio — sufiĉis por ĉiuj, de la plej sensignifaj ĝis la plej meritplenaj. La manĝaĵo de la doma kuirejo satigis kaj la generalon kaj la simplan soldaton. La ĝeneralaj uniformoj — unu por laboro, unu por libertempo kaj unu por soldata kaj polica servoj — estis egalaj por ĉiuj, viro kaj virino, kaj por altranga kaj malaltranga, kun la escepto

de la gradindiko. Eĉ la ĉi-lasta en la vero ne estis pli bel-aspekta por unu ol por alia. La aspira faktoro en pli alta estrindiko kuŝis nur en tio, kion ĝi simbolis. Tiel ege spiritplena, mi pensis kontenta, estas fakte ĉiu kunsoldato en Mondio, ke tio, kion li sentas kiel plej altvalora en la vivo, apenaŭ havas pli konkretan formon ol tiun de tri nigraj festonoj sur la maniko — tri festonoj, kiuj estas por li garantio kaj pri lia memestimo kaj pri la estimo flanke de la aliaj. Oni povus satiĝi kaj trosatiĝi de la materiaj ĝuaĵoj — ĝuste tial mi kredas, ke la dekduĉambraj loĝejoj de la civilismaj kapitalistoj ankaŭ nur estis simbolo — sed ĉi tiu plej subtila el ĉiuj, kiun oni ĉasas en formo de gradindiko, ĝi neniam trosatigas. Neniu havas tiom da estimo kaj memestimo, ke li ne volas havi pli. Sur tio, kio estas plej spirita, plej aera kaj plej neatingebla el ĉio, baziĝas nia firma socia ordo, sekura por ĉiam.

Tiel mi staris en pensoj ĉe la metroa supreniro kaj vidis kiel en songo la gardiston iri tien kaj reen laŭ la pikdrate kovrita distrikta muro. Kvar trajnoj jam venis, kvar fojojn la aroj elverŝiĝis en la taglumon, kiam fine Linda pasis la barilon. Mi rapidis al ŝi kaj ni pluiris flank-ĉe-flanke.

Ni kompreneble ne povis paroli pro la ekzercado de la aerarmeo, kiu nek tage nek nokte permesis, ke oni interparolu ekstere. Ŝi vidis ĉiukaze mian feliĉan mienon

kaj kapjesis kuraĝige, kvankam serioza kiel ĉiam. Ne pli frue ol kiam ni atingis la loĝdomon kaj la lifto estis kondukinta nin malsupren al nia loĝejo, relativa silento ĉirkaŭis nin — la bruo de la metroo, kiu skuigis la murojn, ne estis pli forta ol ke oni povu paroli senĝene — kaj tamen ni zorgeme prokrastis ĉiujn interparolojn, ĝis kiam ni estis interne. Se iu estus rimarkinta, ke ni parolas en la lifto, tiu povus prave supozi, ke ni priparolas temojn, kiujn ni ne volas, ke la infanoj aŭ la servistino aŭdu. Okazis, ke ŝtatmalamikoj kaj aliaj krimuloj volis uzi la lifton kiel konspiraciejon; tio estis natura solvo, ĉar policorelo kaj policokulo pro teknikaj kaŭzoj ne povas esti instalitaj en lifto, kaj ĉar la pordisto kutimas havi aliajn okupojn ol kuri kaj aŭskulti en ŝtuparoj. Ni do atente silentis, ĝis kiam ni eniris la familian ĉambron, kie la servistino de la semajno jam surtabligis la manĝon kaj atendis kun la infanoj, kiujn ŝi subenprenis de la infanejo de la domo. Ŝi ŝajnis esti ordema kaj afabla junulino, kaj nia ĝentila saluto ne dependis nur de la konscio, ke ŝi, kiel ĉiuj servistinoj, estas devigata raporti pri la familio je la fino de la semajno — reformo, kiu ĝenerale vidite plibonigis la tonon en multaj hejmoj. Etoso gaja kaj agrabla regis ĉe nia tablo, speciale ĉar nia plej aĝa filo, Ossu, estis inter ni. Li venis vizite de la infantendaro, ĉar estis hejmvespero.

—Mi povas rakonti ion plezuratan, mi diris al Linda super la terpomsupo. Mia eksperimento tiom progresis, ke mi rajtos komenci per homa materialo morgaŭ, sub la superrigardo de kontrolestro.

—Kiu estos, laŭ vi? Linda demandis.

Laŭekstere oni certe ne povis rimarki, sed interne mi skuiĝis je ŝiaj vortoj. Ili povis esti tute senkulpaj. Kio povis esti pli natura, ol ke edzino demandu, kiu estos la kontrolestro de ŝia edzo? De la ĉikanemo aŭ komplezo de la kontrolestro dependis, kiom longa la pruvtempo fariĝos. Okazis eĉ, ke gloravidaj kontrolestroj alpropriĝis al si la malkovron de la kontrolato, kaj oni havis kompareble malmulte da eblecoj defedi sin de tio. Ne estas do strange, ke ies proksimumoj demandis, kiu li estos.

Sed mi kaŝaŭskultis subtonon en ŝia voĉo. Mia plej proksima estro, kaj do verŝajne mia estonta kontrolestro, estis Edo Rissen. Kaj Edo Rissen pli frue estis dungita en la nutraĵfabriko, kie Linda laboras. Mi sciis, ke ili havis iom da reciproka kontakto, kaj pro pluraj signetoj mi konkludis, ke li iom impresis mian edzinon.

Pro ŝia demando vekiĝis mia ĵaluzo kaj ekflaris. Kiel intima estis en la vero la rilato inter ŝi kaj Rissen? En granda fabriko povis ofte okazi, ke du personoj troviĝis ekster la videblo de aliaj, ekzemple en magazeno, kie pakegoj kaj kestegoj kaŝis la rigardon tra la vitraj vandoj

kaj kie eble eĉ neniuj havis okupon je tiu okazo... Ankaŭ Linda havis laŭvice deĵoron kiel nokta gardisto en la fabriko. Rissen povis havi sian gardadon samtempe. Ĉio estis ebla, eĉ la plej terura el ĉio: ke ŝi daŭre amis lin kaj ne min.

Karin Boye

Enkonduka ĉapitro de samnoma romano

Tradukis Franko Luin

Panpeco kun Anna

Ŝi estis sesjara, kiam ŝi travivis la miraklon. Ŝi neniam forgesis tion. Oni nomis ŝin "Beko," ĉar ŝi sin miksis en ĉion kaj havis respondon je dispono kaj klare diris sian opinion, kiam io ne plaĉis al ŝi. Sed tiun tagon oni simple silentigis ŝin.

Por la unua fojo ŝi estis tute ekster tio, kio okazis, kaj ne komprenis, kion tio signifas. La patrino staris tenante sin je la litekstremo, tordis sin kaj havis dolorojn. La patro kuris ĉirkaŭen serĉante sian kalkmakulitan masonistan ĉapon kaj poste forrapidis sen stari antaŭ la spegulo en la halo, kiam li surmetis ĝin. Kaj li, kiu estis tre silentema, kriis, ke li venigos "la virinon".

La plej maljuna fratino de Sofia irigis la grandfraton Sigge al la lernejo. Kaj Gerda akompanis Andreas al la ŝuriparista paro, geonkloj Lars kaj Elin. Sofio puŝis Elsan eksteren sur la ŝtuparon kaj diris, ke ŝi forestu, ĝis kiam oni alvokos ŝin. Ŝi ĵetis al ŝi la mantelon kaj la ĉapon kaj siblis:

—Kuru en la korton, mi diras, kaj restu tie, ĝis kiam oni alvokos vin.

Tio okazis ĝuste kiam "la virino" supreniris la ŝtuparon afable salutante al Elsa, kiu nur fiksrigardis ŝin kaj ŝian nigran valizon. Kion ŝi povus havi en la valizo? La patro ne kunestis, do li verŝajne estis irinta al la konstrulaborejo kiel kutime. Se nur la virino volus rapidi iom, ĉu ŝi ne komprenis, ke la patrino estas malsana?

En la vestiblo estis trankvile kaj sekure, kvankam la pordo al la kelŝtuparo klakis kaj la vento fajfante ensiblis tra la spaco inter la ŝtonplanko kaj la ekstera pordo. Ŝi sidis sur la ŝtuparŝtono kun bona konscienco. La aliajn tagojn tio estis malpermesata, sed hodiaŭ ne estis kiel dum la aliaj tagoj.

Elsa sidis premante bulojn el argilo, kiujn ŝi duonmeĥanike formis en bulojn kaj panojn kaj vicigis sur la ŝtupon. Ne eblis ŝajnigi ion hodiaŭ. La buloj ja estis nur argilo kaj la sekvinberoj estis ŝtonetoj. Ŝi sidis kvazaŭ letargie, rigida pro malvarmo. Kio estis tiel stranga pri la nigra valizo, kiun la virino estis portinta? Pri kio ĝi memorigis — jes, pri Gunni Nicklasson, kiu iun tagon diris, ke ili ricevis sian malgrandan fratinton de virino, kiu alportis ŝin en nigra valizo. Ne, vi mensogas, Elsa estis respondinta, sed tamen ŝi sentis sin malcerta kaj malsekura. Kelkfoje ŝi estis demandinta sin, de kie venas la etaj infanoj, sed ĉiam io malhelpis, kiam ŝi volis

demandi al panjo. Sed tiun fojon ŝi ekkuris de Gunni kaj suprenkuris al panjo kaj diris senspire, serioze kaj rekte:

—Panjo, kiel vi ricevis min?

Panjo vere ekhaltis. La fenestro estis malfermita kaj panjo staris ĉe la kuireja elverŝujo senŝeliganta terpojmojn, ŝi hezitis momenton antaŭ ol ŝi turnis sin al Elsa, kiu staris tiel streĉita, plena de sankta sciavido, kaj tiam la vero elglitis el ŝi:

—Vi venis el mi.

Do ne estas vere, ke Gunni ricevis sian etan fratinnon de virino, kiu prenis ŝin el la Saliklaĝetoj?

—Ne, respondis panjo tute simple, kaj aldonis kvazaŭ por malhelpi al Elsa fari pluajn demandojn:

—Kuru malsupren kaj ludu ankoraŭ iom da tempo. Ni baldaŭ tagmanĝos.

Elsa sin frotis kontraŭ la jupo de panjo, kontenta pri la klara respondo. Ŝi denove kuris malsupren, ŝteliris sur la grundon de Nicklasson por senĝene cerbumi. Tia estis la afero. Infanoj, etaj vivantaj infanoj, ne povas elveni el nenio. Ne per cikonio kaj ne el la Saliklaĝetoj. Ĉi tie malantaŭ la malnova lignoamaso Elsa eltrovis, ke ŝi ĉiam sciis pri tio. Sed tio estis kaŝita interne de ŝi, ĝis kiam panjo elvokis la ĝustan respondon.

Ŝi sidis sur la ŝtuparo kaj sentis, kiel ŝi malvarmas. Pordo malfermiĝis kaj fermiĝis de iu tie supre kaj la maljuna sinjorino Rössel lamiris malsupren en la ŝtuparo. Ŝi

estis afabla kaj parolema kaj ŝi ŝatis Elsan. De tempo al tempo ŝi invitis ŝin kaj montris bildojn el Ameriko. Elsa leviĝis kaj preparis sin por saluti tute gracie. Eble ŝi rajtos eniri ĉe sinjorino Rössel. Ŝi forgesis la bulkojn kaj panojn kuŝantaj meze de la ŝtupo.

—Kial vi sidas ĉi tie kaj malpurigas la ŝtuparon? Tio ne estas ludejo, kolere diris sinjorino Rössel kaj piedbatis la rubaĵaron, tiel ke la argilbuloj ĉirkaŭflugis kaj poste ŝi plulamiris malsupren en la kelon kun sia karbositelo, murmuranta ion pri homoj, kiuj venigas en la mondon pli da infanoj ol ili kapablas teni puraj.

Elsa sin premis kontraŭ la muro, senmova kaj nekomprenanta. Ŝi ja tiel ofte estis ludanta sur la ŝtuparo kaj sinjorino Rössel ne fariĝis kolera. Ŝi rigardis siajn argilŝmiritajn manojn kaj palpis sian vizaĝon. Malpura —ĉu ŝi kulpis —tio estis maljusta. Ŝi preskaŭ estis preta kuri malsupren en la kelon al sinjorino Rössel por klarigi, sed io ŝin malhelpis. Tio, kion sinjorino Rössel diris, kvankam ŝi ne komprenis la vortojn, la tono kaj la kolera rigardo pikis. Estis malice dirite pri panjo —same kiel tiam, kiam Gunni ekkriis, ”vi ne havas belajn tapiŝojn, nur ĉifontapiŝojn eeehhh”.

Stria en la vizaĝo pro larmoj kaj argilo ŝi kunkolektis la argilbulojn, kuris sur la straton kaj ĵetis ilin en la stratan defluejon, turnis sin malrapide kaj supreniris la ŝtuparon por aŭskulti ĉe la pordo. Sed tie staris ”la virino”

fermanta sian nigran valizon, kaj parolis kun Sofia. Ili aspektis tiel kontentaj, ke la kuraĝo de Elsa altiĝis. Panjo certe estis sana nun. La virino karese frapetis ŝin.

—Vi estas brava knabino. Tion mi vidis la unuan fojon, kiam vi malfermis la okulojn. Sofia varmigis ŝiajn malvarmajn manojn.

—Vi certe malsatas. La kaĉo tuj estos preta. Mi lavos vin, poste vi eniru al panjo. Mi povas diri al vi, ke ni havas ion belan por montri al vi.

Sed Elsa ne povis forgesi tion, kion sinjorino Rössel estis dirinta.

—Sinjorino Rössel iris malsupren en la ŝtuparo kaj fariĝis tre kolera, ĉar mi ludis tie, kaj diris, ke ni havigis al ni pli da infanoj ol ni kapablas teni puraj.

—Ĉu ŝi vere diris tion! Ni havas tiom da infanoj kiom ni volas, sen demandi al sinjorino Rössel.

Agrable malpeziĝis, kiam la pli aĝa fratino defendis panjon. Ĉio nun estis tiel bona. La agrabla varmo, kiu elfluis el la kuireja kameno. La kafo, kiu vaporis en la bolpoto. Ŝia propra blua telero kaj glaso sur la vakstuko. Ĉiuj tiuj ordinaraj objektoj, kiujn ŝi kutime ne rimarkis, sentiĝis belaj kaj sekuraj. Nur la fermita pordo ankoraŭ maltrankviligis ŝin.

Sofia singarde malfermetis la pordon de la ĉambro kaj diris mallaŭte:

—Ĉu panjo dormas?

Elsa staris plena de atendo — de io, kion ŝi ne povis klarigi al si mem, sed ŝi antaŭsentis ion neesprimeblan kaj aŭdis la voĉon de panjo.

Elsa restis momenton sur la sojlo kaj rigardis en la ĉambron. Panjo kuŝis en la granda etendebla lito, pala kaj senmova, sed tamen luma. La hararo, kutime tufa, estis malseketa kaj kuŝis glate forkombita de la blanka frunto. La mano de panjo, kun la ringoj maldikaj de uzado, kuŝis sur la nova ŝtofpeca kovrilo, kaj ŝi havis belan litotukon kun larĝaj punktoj. La ovala tablo, kiu dumtage staris antaŭ la sofo, estis metita ĉe la fenestro. La kurtenoj estis duone tirfermitaj. Inter ili staris la lilio, floranta. Hieraŭ nur panjo miris, kiun tagon ĝi ekfloros. La sangruĝa kaliko estis subtenata de fiera trunketo. Sed la folioj kliniĝis gracie, kvazaŭ ili estus imponegataj de la beleco de la floro. Neniam antaŭe sentiĝis tiel solene en la ĉambro.

—Venu, Beketo, panjo vokis karese. Elsa heziteme paŝis al la lito. Sed ŝi ne kuraĝis iri tute proksimen. Ŝajnis, ke patrino ne estas tute reala. Ŝi sendis timeman, eviteman rigardon al panjo. Tiam panjo ridetis kaj levis angulon de la kovrilo kaj diris kvazaŭ pardonpetante:

—Estas via fratineto. Ĉu vi ĝojas pri ŝi?

Elsa ektemis antaŭ la miraklo kaj jesflustris. Sed malklara doloro leviĝis kiel ondo kaj preskaŭ blindigis ŝiajn okulojn. Ŝi sentis kvazaŭ maljustaĵo estis farita al ŝi.

Ŝi volis mem kuŝi tie sur la brako de panjo kaj premi la kapon kontraŭ ŝia brusto kaj esti malgranda kaj ne granda brava knabino. Tiam ŝi sentis, kiel panjo karesas ŝian hararon kaj kondukas ŝin trans la profunda fendo, kiu komencis kreski inter ŝi kaj panjo.

—Infano mia, iru ĉirkaŭen al la alia flanko. Deprenu viajn ŝuojn kaj prenu la lankovrilon, kiu kuŝas ĉe la piedparto, kaj metu ĝin ĉi tien, kaj poste rampu supren al panjo. Sed kuŝu tute kviete, ĉar panjo estas tre laca.

Kiam Sofia eniris, ĉiuj tri estis bone dormantaj.

Herta Wirén

*Fragmento el samnoma romano
El la sveda tradukis Vivi Couppez*

Singoalla

Iun somertagon okazis, ke Erland revenis el ĉasiro. Sur la supro de altaĵo en la arbaro kreskis piceo, juna kaj svelta, sed pli alta ol ĉiuj ĉirkaŭaj arboj. Ĝia pinto estis videbla tra la fenestroj de la kastelo, kaj kiam ĝi siluetiĝis kontraŭ la ruĝa vespera ĉielo, aspektis kvazaŭ sopire ĝi rigardus malproksimen kaj dezirus troviĝi en lando de palmoj.

Ĉe la piedo de la altaĵo muĝetis roĝo super sablo kaj silikoj survoje al la lago. En la arbaro la roĝo havis bruon fluejon inter muskokovritaj ŝtonoj kaj centjaraj arbradikoj, sed ĉi tie ĝiaj bordoj ebeniĝis je herbotapiŝo, kie abundis bluaj, blankaj kaj ruĝaj floroj. Ĉi tie Erland ofte sidis, ĝoja pro pinsusuro kaj soleco; ĉi tien li ankaŭ nun direktis siajn paŝojn por trinki freŝan akvon el la roĝo. Käck kaj Grip, la du hundoj, akompanis lin.

Atinginte la pinton de la altaĵo li haltis mirigita, ĉar li ekvidis ion neordinaran malsupre. Tie apud la roĝo sidis junulino. Li ne vidis ŝian vizagon, ĉar ŝi ne rigardis al li, sed li vidis karbonigrajn harbuklojn, fanditaj super

nudaj ŝultroj kaj sur malhela vesto, kiu estis ornamita per multkoloraj rubandoj. La junulino trempis jen unu piedon jen la alian en la akvon. Ŝi ŝajne gajigis pri la freŝeco, eble ankaŭ pri la akvovezikoj, kiuj naskiĝis en tiu ludo. Kaj nun ŝi komencis kanti per laŭta, belsona voĉo, kiu ricevis reeĥon en la arbaro.

Kiu ŝi estis? Vilaĝana filino ŝi ne estis, tion Erland deduktis el ŝiaj gestoj, el ŝia vesto kaj el la kanto, kiu sonis tute alie ol la kantoj, kiujn la junulinoj en la regiono kantis, kiam ili en la profunda arbaro serĉis la brutaron. Sed kiu ŝi estis? Ĉu elfino aŭ ensorcita princino? Silenta kaj miranta Erland staris sur la altaĵo, kaj en sia koro li sentis sekreton, neklarigeblan, teruran sed tamen allogan.

Sed Käck kaj Grip direktis al ŝi furiozajn okulojn kaj kolere murmuris. Kaj dum Erland staris droninta en rigardado kaj pensado, Grip ekkuris malsupren, kvazaŭ ĝi volus disŝiri la nekonatulinon.

Tiam Erland ekvidis ŝian danĝeron kaj tuj revokis la hundon. Sed antaŭ ol tio okazis, la junulino rapidege sin turnis, ekstaris kaj ĝuste kiam la hundo boris siajn akrajn dentojn en ŝian jupon, ŝi puŝis ponardon en ĝian kolon. Kun peceto de ŝia jupo inter la dentoj la hundo ruliĝis al ŝiaj piedoj.

La okuloj de Erland flamegis pro kolerego, kiam li vidis la malfeliĉon de sia fidela Grip, kaj per rapidaj paŝoj li aliris kaj kriis:

—Kiu vi estas, kiu tion aŭdacis?

Sed la junulino per grandaj, nigraj, fulmantaj okuloj rigardis al la blonda grandsinjora filo, ŝiaj brunaj vangoj ruĝiĝis, la lipoj tremis, kaj la sangogutantan ponardon ŝi svingis tiel, ke la ruĝaj perloringoj ĉirkaŭ la nudaj brakoj tintadis.

—Ĉu vi volas mortigi min? ŝi demandis per akra voĉo, kiu havis fremdan akcenton.

Kaj defende ŝi levis la ponardon kontraŭ la alian hundon, kiu intencis ataki ŝin.

Erland ordonis al Käck kuŝiĝi, sed ĉar ĝi ne tuj obeis al la voĉo de la mastro, Erland per la ĉasarko frapis la beston, tiel ke ĝi returniĝis blekante.

La okuloj de la gejunuloj renkontiĝis. La rigardoj de ambaŭ estis obstinaj. Sed kiel ajn, la lipoj de la junulino ekridetis.

—Mi ne timas vin, ŝi diris kaj ĵetis la ponardon, tiel ke siblante ĝi tranĉis la aeron kaj per la pinto fiksiĝis en arbo.

La kolero de Erland transiĝis en miron kaj scivolemon.

—Vi estas stranga junulino, sed estus malbone, se en viraj sportoj mi ne povus konkuri kun virino.

Li elingigis sian ĉastranĉilon kaj ĵetis ĝin kontraŭ la saman arbon. La tranĉilo penetris en la arbon apud la ponardo, sed tiel profunde, ke duono de la klingo kaŝiĝis en basto kaj ŝelo.

Li iris al la arbo kaj liberigis la du armilojn, lavis ŝian en la roĝo kaj redonis ĝin al la posedantino.

—Vi estas bela junulino, li diris, sed tre neordinara ... Ĉu vi volas, li aldonis hezite, ke mi mortigu la alian hundon, ĉar ĝi koleras al vi?

—Ne, respondis la junulino kaj ŝovis la ponardon en la ingon, kiun ŝi portis ĉe la zono, la hundo estas senkulpa, ĉar ĉiuj bestoj estas tiaj, kiaj iliaj posedantoj volas, ke ili estu. Sed vi mem ŝajnas esti malmilda kaj malbona junulo.

Kaj la nekonatulino logvokis Käck, kiu je signo de sia mastro rampante proksimigis al ŝi. La junulino karesis ĝian hirtan kapon.

—Pardonu al mi, diris Erland, vi pravas: mi estas malmilda kaj malbona, sed ne kredu, ke mi incitis la hundon. Mi ne volis al vi ian malbonon.

—Mi volonte kredas al vi. Pli profunde ŝi rigardis Erlandon en la vizaĝon. Ĉu vi logas najbare?

—Jes.

—Adiaŭ, diris la junulino. Verŝajne ni ne renkontiĝos. Ŝi jam estis preta rapidi en la arbaron, kiam Erland, elreviĝante levis sian kapon kaj ekkriis:

—Ne, ne, haltu!

Li diris tion per tia tono, ke la nekonatulino turnis sin.

—Sciigu al mi vian nomon, diris la junulo kaj kaptis ŝian manon.

—Vi estas scivolema.

—Ne, mi ne interesiĝas pri via nomo, se vi nur volas sciigi al mi, de kie vi venas kaj kial ni ne plu renkontiĝos.

—Mia nomo estas Singoalla, de malproksime mi estas veninta kaj nenie mi restadas.

—Kaj sekve ni neniam renkontiĝos, ĉu?

—Kial vi okupiĝu pri mi? Jam morgaŭ vi estos forgesinta min.

—Ne, neniam mi forgesos vin.

Anstataŭ respondi Singoalla kliniĝis, ŝiris ruĝan floron, ĵetis ĝin en la rojon kaj kuris en la arbaron.

Erland staris sola. Lia rigardo ŝvebis post la malaperinta junulino. Tiel li staris dum momento, silenta, senmova, revanta. Fine li vekiĝis pro la bleko de Käck. Maltrankvile la hundo rigardis al sia mastro, ĉar ĝi ne kutimis vidi lin tia. Sed Erland surŝultrigis la ĉasarkon kaj malrapide supreniris la altaĵon.

Viktor Rydberg

Fragmento el samnoma romano

El la sveda tradukis Arvid Skoglund

La nazo

Ĉu estas iu eraro je mia vizaĝo? Mi rigardis antaŭ min, kaj tie ŝi staris, la virino, kiu sidis iom oblikve antaŭ mi je la alia flanko de la koridoro kaj kiun mi iom kaŝe rigardis. Mi unue rimarkis ŝian profilon: ŝi havis iom pintan nazon kaj estis preskaŭ rekta linio de la nazo al la frunto kaj al la pinto de la mentono. Mi devis korekti min mem: ne estis rekta linio, ĉar la frunto, la brovoj, la mentono kaj la tre delikataj kaj bele formitaj lipoj onde formis tiujn liniojn al la pinto de la nazo.

Ŝi ŝajnas esti de la ĝusta aĝo, mi pensis. Mi rigardis al ŝiaj manoj kaj rimarkis, ke ili ne estas tute glataj, kiel ĉe dudekjarulino. Ili jam iom sulkiĝis, sed neniu sulko estis videbla sur ŝiaj frunto kaj vizaĝo. Kiam ŝi turnis la kapon kaj mi povis vidi ŝin ankaŭ defrunte, mi kapjesis al mi mem kaj diris Jes, ŝi povus taŭgi, ŝi povus tute bone taŭgi. Ŝi havis vizaĝon, kiu memorigis al mi vizaĝon de virino, kian oni povas renkonti en la Balkano, kroatan aŭ

serban, kaj tio ne tre malsimilis al la ideo, kiun mi faris al mi mem pri Kari.

Kaj nun ŝi staris tie antaŭ mi kaj kiam mi turnis mian kapon supren por vidi, kion ŝi volas, mi rimarkis je ŝia mieno, ke ŝi ne estas kontenta. Io kolera estis videbla ĉirkaŭ la okuloj kaj ĉirkaŭ la buŝo.

—Pardonon? mi diris.

—Mi miras, ĉu estas ia eraro je mia vizaĝo. Vi tiel longe gapis al ĝi.

Mi nee skuis la kapon.

—Ne, ne. Estas nenia eraro je via vizaĝo.

—Kial vi do tiom rigardis al ĝi, ŝi demandis.

—Nu, kiel diri, mi hezitis. Bonvolu sidiĝi, mi klarigos. Ŝi plustaris antaŭ mi.

—Vidu, mi denove hezitis. Mi nur pensis, kiel mi povus priskribi vian vizaĝon.

Nun ŝia vizaĝo aspektis pli mirigita ol kolera.

—Kaj kial vi priskribu mian vizaĝon, ŝi demandis en malpli severa tono.

—Estas tiel, ke mi cerbumas pri iu persono en rakonto, kaj mi devas al tiu persono doni vizaĝon. Kiam mi vidis vin, mi pensis, ke eble via vizaĝo estus taŭga por tiu persono.

La demandosigno ne malaperis el ŝia vizaĝo.

—Ĉu vi estas verkisto? ŝi demandis.

—Ne, mi repondis kun ioma hezito. Mi eble skribos iam. Por nun mi nur konstruas iaspecan rakonton.

—Kaj en tiu rakonto estos mia vizaĝo, ŝi diris.

—Ĝi povos esti. Nun mi nur cerbumis, ĉu ĝi povus taŭgi por la persono, pri kiu mi pensas. Mi ankoraŭ ne scias. Ĝi havas kelkajn trajtojn, kiuj similas al tiuj, kiujn mi imagis al mi, sed mi ankoraŭ ne certas, ke tio estas ekzakte tio, kion mi havas en mia kapo.

Ŝi sidiĝis antaŭ min, tiel ke estis pli facile interparoli. Mi ne plu bezonis streĉi mian kolon kaj suprenrigardi al ŝi.

—Diru al mi ion pri via rakonto.

Mi ne sciis, de kie komenci kaj ekparolis iom tirante la vortojn: Ĝi temas pri viro, kiu havis akcidenton kaj pri lia batalado rricevi plenan homecon, do, eliri el tiu akcidento kaj refariĝi plene funkcia homo.

—Kaj tiu viro havos mian vizaĝon? ŝi sonis mirigita.

—Ne, ne, mi tuj interrompis. Tiun vizaĝon, vian vizaĝon, se mi sukcesos priskribi ĝin, havos unu el du virinoj, kiuj helpas lin tuj post lia akcidento, kiuj veturigas lin al malsanulejo, kaj kiuj estas la du personoj, kiujn li post la operacioj unue memoras.

Aperis rideto sur ŝiaj lipoj kaj mi rimarkis, ke ŝi ŝajnas esti flatita de la ideo, ke ŝia vizaĝo aperu en rakonto.

—Ĉu tiu, kiu havos mian vizaĝon, estas interesa persono?

—Mi supozas tion, mi iom hezitis. La viro en mia rakonto memoras ion nigran: nigre vestita virino, kun larĝa nigra hararo - tute alia ol vi havas, tute nigra kaj rekte tondita. Sed kion li plej memoras estas grandega nazo. La nazo aspektas al li grandega, ĉar li kuŝas sur la dorso kaj vidas ĉion desube. Li estas krom tio grave vundita kaj eble jam forte febras.

—Mi scias, ke mi havas grandan nazon, ŝi interrompis min, sed ĉu grandegan?

—Kompreneble ne. Tio estis lia impreso, li estis vundita, febranta kaj lia vido montris ion nerealan. Krom tio lia memoro post la narkozo ankaŭ ne tute bone funkciis. Kaj fakte poste, kiam li revidos tiun virinon, jam iom pli sana, li mem miros, de kie venis lia impreso pri granda nazo.

Ŝia rideto fariĝis iom pli larĝa.

—Kio okazos al tiu virino kun mia vizaĝo?

—Mi ne tute scias ankoraŭ; mi ne estas preta kun tiu rakonto; ŝi aperos en ĝi jen kaj jen kaj...

—Ĉu ŝi havos rilaton kun via viro?

Mi rimarkis, ke ŝi faris mallongan paŭzon antaŭ ol ŝi eldiris la vorton rilato. Oni povas kompreni ĝin en malsamaj manieroj, sed mi tuj kaptis, kion ŝi celas per ĝi.

—Jes, oni povus diri tion, mi hezitis. Nur je la fino de la rakonto. Komence la renkontiĝoj inter ili estos tre ha-

zardaj: unue, kiam ŝi kaj la alia virino helpas lin veni al la malsanulejo, poste vizito al la malsanulejo, ĉar ili sciolis kiel travivis 'ilia' vundito. Okazos ankaŭ pli posta renkontiĝo, kiam li estas jam duonsana kaj povas mem moviĝi, kiam li provas montri sian dankemon, ke ili helpis lin. Tio estas ordinara renkonto de iu, kiu faras donaceton kaj kiu restos sen sekvoj. Sed iun monaton pli poste okazas hazarda renkontiĝo inter ili. Li ekskursas kaj ŝi ekskursas kaj ili rimarkas unu la alian sur la sama veturilo. Kaj ĉar ili tamen konas unu la alian, ili interbabilas kaj iom kunumas en la loko, al kiu ili veturis. Depost tiam la kontaktoj inter ili intensiĝas, parte ĉar ŝi interesiĝas pri lia sorto, ne nur lia resaniĝo, sed ankaŭ pri la sekvoj, kiujn ĝi havis, ekzemple rilate al lia labor-situacio.

—Ĉu neniuj seksumadoj inter ili? ŝi demandis.

—Fakte ne. Ne forgesu, ke li estas altgrade invalido. Eĉ se ŝi havas eble iun ideon en tiun direkton. Ĉe li tiu bezono ne aperas, ne demandu min kial.

—Diru al mi, kiu ŝi estas, ŝi diris.

—Ŝi estas dudek okjara, instruistino, mi serĉis informojn pri ŝi en mia kapo, daŭre fraŭlino, sed havas firman rilaton kun iu, kun kiu ŝi jen kaj jen kunvivas, sed la rilato inter ili ne ĉiam estas idilia. Ŝi havas duonfratinton, laŭ kiu tiu kunulo estas 'fekkapulo'. Ŝi tute mal-

estimas lin kaj opinias, ke li nur interesiĝas pri si mem kaj nur uzas aliajn homojn. Estas ŝia firma konvinko, ke la fratino, tiu kiu eventuale havos vian vizaĝon, ke ŝi prefere rompu kun sia kunulo.

—Ĉu ŝi sekvos tiun konsilon?

—Ŝi faros. Ŝi jam survojas al tio je la komenco de la rakonto kaj dum la rakonto ŝi tion faros.

—Kia virino ŝi estas cetere?

—Nu, nenio speciala. Ŝi vivas ĉiutagan vivon, havas ie patrinon, ie patron. Ho jes, mi subite memoris. La kaŭzo, kial mi tiom interesiĝis pri via vizaĝo, kaj nazo, estas la patro. Li estas nome greko el Cipro kaj de li ŝi heredis la nigron de la haroj kaj la formon de la nazo, formon, kiu estas ofta en Greklando kaj en orienta Mediteraneo. Ĝi malsimilas al svedaj nazoj kaj ...

—Sed mi ne havas grekon kiel patron, almenaŭ ne laŭ mia scio, ŝi interrompis.

—Ne, ne, tial mi ne estas certa, ke mi povos uzi vian vizaĝon en mia rakonto. Via nazo havas ne ĉiutagan formon, tial mi entute ekinteresiĝis pri ĝi. Kio igis vin rimarki, ke mi rigardadas vian vizaĝon, estas tio, ke mi provis imagi al mi, kiel via nazo aspektus al mi, se mi kuŝus sur la planko kaj de tie rigardus al ĝi. Cerbumante pri tio, mi evidente tro longe fiksis mian rigardon al vi. Pardonu, se tio ĝenis vin.

Ŝi nenion diris, sed mi rimarkis, ke ŝi ion pripensas.

—Ĉu vi daŭre deziras vidi mian nazon de sube?

—Jes, mi ŝatus, mi diris.

—Bonvolu, ŝi diris.

Ŝi levis la kapon supren, rigardis al la plafono kaj mi rigardis ŝian kolon, la mentonon, la fermitajn lipojn kaj rekte en la nazotruojn.

Ĝi ne taŭgas, mi pensis, tro mallarĝa, tro eleganta. Kiom ajn febranta, neniu povus opinii tiun nazon granda, eĉ malpli grandega.

Ŝi reklinis sian vizaĝon kaj rigardis min.

—Mi kredas, ke mi devos rezigni je via vizaĝo, mi diris kun bedaŭro, kvankam ĝi havas tre belan profilon.

—Dankon, ŝi diris.

Estis iom da silento inter ni, poste ŝi demandis:

—Kaj kio okazos al ĉi tiu historio via?

—Mi ne scias ankoraŭ.

—Ĉu vi skribos ĝin?

—Estas ĉiam mia intenco skribi miajn historiojn, sed ĝis nun tio neniam realiĝis. Ili daŭre restas nur en mia kapo, diversaj epizodoj el ili, ne ĉiam kunligitaj. Sed ĉi tiu historio estas alia. Mi scias, kiel ĝi komenciĝas kaj mi scias, almenaŭ supraĵe, kiel ĝi finiĝos. Ankaŭ la plejparto de la aliaj okazaĵoj jam pretas, eĉ se ne en ĉiuj detaloj. Ĝi temas pri la monatoj, dum kiuj la viro en mia rakonto

batalas por sia travivo: en malsanulejo, hejme, pri lia rifuzo ekuzi rulĉaron, kiam la kuracistoj asertas, ke ne ekzistas alia solvo por li, pri lia iom-post-ioma reaktivigo de la muskoloj, lia batalo por sia laboro. Ĉio ĉi estas tiom, ke sufiĉus por tuta libro.

—Mi vere ŝatus legi tiun libron, ŝi diris. Skribu ĝin. Cetere, kiel ĝi finiĝas, ĉu feliĉe?

—Jes, kontentige por mia viro.

—Kaj por ŝi?

—Kontentige por ŝi, mi kredas, almenaŭ tiom, kiom mi povas vidi ĝis nun. Mi povas ja decidi, kio okazu en la libro, sed tamen ne estas tiel simple. Se mi aldonas novan epizodon, ĝi povas kaŭzi sekvojn, kiujn mi ne antaŭvidis. Sed laŭ tio, kion mi scias nun, estos kontentiga fino.

—*Happy end*, ŝi diris.

—Jes, oni povus diri tion.

—Mi ŝatus legi tiun vian rakonton, ŝi ripetis post kelkminuta paŭzo inter ni. Ĉu vi kredas, ke tio eblos?

—Eventuale, mi diris. Dependas unuavice de tio, ĉu mi entute iam komencos skribi ĝin.

—Mi ŝatus legi ĝin, eĉ se ne estos mia vizaĝo en ĝi.

—Eble iom de vi tamen estos en la rakonto.

—Kio? ŝi demandis.

—Mi ne scias ankoraŭ. Eble via scivolemo, via maniero alfronti fremdan viron, kiam vi sentis vin ĝene pri-

traktata, via reago al la demando "Kial tiu diabla viro rigardadas min?". Eble tio estos trajto, kiun mi donos al ĉi tiu virino, kiu ne havos vian vizaĝon, sed kiu eble tamen havos parton de via vizaĝo, ĉar via vizaĝo ne tro malsamas al tiu, kiun mi imagis al mi, nur ke mi devos trovi alian nazon por ĝi. Via nazo estas, cetere, tre bela.

—Ne, tion mi ne opinias. Ĝi estas tro pinta.

—Ĝi estas taŭga nazo por tre bela vizaĝo, mi diris.

—Nun vi parolas eksterteme, sinjoro, ŝi diris kun petolemo en la voĉo.

Estis denove silento inter ni.

—Se vi skribos tiun libron, kiam estos tio? ŝi demandis.

—Mi vere ne scias.

—Kaj kiel mi povos scii, ke ĝi estas skribita?

—Tion vi ne povos.

—Ĉu tio signifas, ke mi devos legi ĉiujn librojn, kiuj aperos iam dum la venontaj dek aŭ dudek jaroj, por vidi ĉu parto de mia nazo eble estas aŭ ne estas en ili?

—Jes, eble tio estas unu solvo. Aŭ eble mi povus sendi ĝin al vi, se vi donas vian adreson.

Ŝi aspektis hezitema.

—Eble ni lasu tiun vian libron.

—Aŭ eble ni renkontiĝos, simile kiel hodiaŭ, kiam mi estos serĉanta alian nazon, kiun mi povu priskribi, kaj tiam mi povus doni ĝin al vi. Mi celas la libron.

—Eble, ŝi diris.

Estis silento inter ni. Evidente ni elĉerpis nian temon.

—Ĉu via virino jam havas nomon, ŝi demandis.

—Ŝi havas tute ordinaran nomon: Karin.

—Tio estas ankaŭ mia nomo, ŝi diris.

Franko Luin

Trebnje, somere 1996

La lasta Kristnasko de mia patro

Estis la antaŭvespero de Kristnasko. Ankoraŭ mi ne fariĝis naŭjara kaj do havis tiun aĝon, kiam Kristnasko estas la eble plej mirakla travivaĵo de la jaro.

Ankoraŭ estis tre frue matene. La mallumo kvazaŭ nigra lanfelo — laŭ nia infana fantazio — kuŝis sur arbaroj kaj kampoj, kie la neĝa kovrilo restis pli ol ulnon dika. Mi vekiĝis, forfrotis la dormon el la okuloj kaj ĉirkaŭrigardis. Abiligna fajro kraketis en la kameno kaj panjo per unu piedo staris sur la fajruja plataĵo ĵetante kelkajn salerojn en la kafkuirilon. Sufiĉe longan tempon mi kuŝis rigardante al la flamoj lekantaj la fulgan masonaĵon kvazaŭ grandegaj ruĝaj langoj. Sed subite mi ekmemoris, ke estas la antaŭvespero de Kristnasko kaj jen mi demandis min, ĉu ni havos kristarbon. Antaŭ kelkaj tagoj panjo diris, ke eble ni ne havos, ĉar patro la tutan vintron nur tre malmulte perlaboris en la altarbaro. Fine mi ne kapablis elteni la nuran sindemandon, sed levis min en la lito singarde subrigardante trans la gablon de la gepatra lito por esplori, ĉu paĉjo kuŝas; sed trovinte,

ke li jam foriris, mi flustris: "Panjo, ĉu ni havos kristarbon?" Panjo ne respondis, nur tiel ĉirkaŭmovis la brulaĵon, ke la fajreroj suprenkiriĝis tra la kamentubo. La silento premis min kaj mi ŝanĝis la demandon: "Panjo, ĉu ni ne havos kristarbon?" La voĉo sonis treme ankoraŭ kaj mi glutis, ĉiam glutis. "Ne, ne, ŝajne ne" panjo respondis kaj ŝia voĉo raŭkiĝis pro retenata ploro. Tiam mi rampis sub la felon kaj premis mian vizaĝon kontraŭ la bruston de mia fratineto, mallaŭte sed maldolĉe plorante. Post tempeto mi aŭdis la paŝojn de paĉjo sur la perono. Mi forviŝis la larmojn per la fratineteta ĉemizoj kaj ŝajnigis dormon, sed tra mallarĝa fendo inter la palpebroj mi subrigardis trans la felorandon. Panjo malfermis la pordon kaj paĉjo envenis kun plenbrako da brulligno, kiun li staplis malantaŭ la kamenmuron, poste eksidis ĉe la tablo kaj panjo alportis terpomojn kaj salan haringon kaj enverŝis kafon. Manĝinte paĉjo deprenis la brunan vojaĝsakon de sur la muro kaj el la ŝrankego elserĉis la ladan bareleton por brando, per kiu ni infanoj kutimis ludi lokomotivon dum la foresto de paĉjo. Ensakiginte la bareleton li ŝovis la peltan ĉapon sur la orelojn, enmetis grandan pecon da maĉtabako kaj aliris la pordon.

"Nu, mi do foriru," li diras al panjo.

"Vi ne forgesu aĉeti kafon kaj sukeron kaj iom da porkaĵo kaj vi ankaŭ bonvolu aĉeti kelkajn bombonojn por

la infanoj. Kaj home revenu hejmen antaŭ ol plene mal-lumiĝos.”

”Se la tempo sufiĉos ... ” Li fermis la pordon malantaŭ si kaj baldaŭ mi aŭdis la delikatan tintilsonoron de nia starsledeto mortiĝanta laŭ la vojo.

Mia patro ne estis drinkulo, kiel populare sin esprimas la abstinuloj. Li devis severe labori en la altarbaroj dum la vintro, kaj revenante hejmen je la festoj li deziris litron kaj por Kristnasko ja eble kvar aŭ kvin. Nur kvar semajnojn li vizitis lernejon, apenaŭ scipovis legi. Li do ne posedis gravan kvaliton por utiligi la pli valorajn distrojn de la vivo. Krome la kutimo al multa trinkado je Kristnasko havas tiel malnovan tradicion, ke neniam venis en la kapon de tiu simpla laboristo eĉ penso pri malfidelo al ĝi. Alie mia patro ne estis indiferenta pri sia familio. Ofte kiam ni havis nur malmulte da manĝaĵo, li mem rezignis por ke ni infanoj satiĝu.

Iom post iom ankaŭ vekiĝis mia malpli juna frato kaj la fratineto kaj ĉiu ricevis sian parton da terpomoj, sala haringo kaj cikorikafo. Sed ni ne manĝis bonapetite tiun antaŭvesperan matenon. Neniu kristarbo ... neniu kristarbo sonoradis en niaj oreloj. Mia frato kaj mi provis esti kuraĝaj, sed la fratineto sidis sur la genuoj de panjo nekonsoleble plorante.

Por momenton lasi la malĝojon mi prenis mian sledeton kaj eliris sur deklivon, kie la infanoj de la vilaĝo ku-

timis kolektiĝi por glitveturado. Sed ankaŭ tie oni diskutis la demandon pri kristarbo kaj Ture, kampobubo samaĝa kiel mi, mokis min, ĉar ni estas tiaj mizeruloj, ke ni eĉ ne havas sufiĉan monon por havigi abian branĉeton sur la plafono, kion ni alie kutimis aranĝi kristnaske. Sed tiam mia malĝojo ŝanĝiĝis en flaman koleron kaj pugninte la manojn mi ĵetis min sur lin kaj furioze luktante ni ruliĝis sur la neĝamasoj. De tiam mi neniam same perforte provis pravigi mian opinion pri ĉies rajto por loko en la suno.

Kiu el ni venkis, mi ne memoras, sed kun sanganta nazo mi ŝteliris hejmen kaj kaŝis min en la fojnon de la kamparano. Tie min trovis la dekokjara stalistino, kiam ŝi venis por tagmeza melko. Ŝi forlavis la sangon kaj levis min sur siajn genuojn konsolante, karesante min. Ŝi mem estis infano de mizero kaj bone komprenis, kiom gravas manko de kristarbo kaj de pli riĉe dotitaj moko pri la mizero.

La palan decembran taglumon ree forviŝis la nigra lanfelo, kiu, ĉiam pli profunden malleviĝante, kovris arbarojn kaj herbejojn. En la dometoj oni bruligis fajron kaj lampon kaj unu post la alia la sledoj kaj starsledetoj revenis el la urbo. Sed paĉjo ne venis. Panjo ekmaltrankviliĝis; iam kaj iam ŝi eliris por aŭskulti laŭ la vojo aŭ demandi al preterveturantoj, ĉu ili vidis paĉjon. Sed neniu lin vidis. Ĉiam malfruiĝis. En la vilaĝo oni lumigis

la kristarbojn, nur ĉe ni regis ĉiutaga krepusko. Silentaj kaj senkuraĝaj ni sidis antaŭ la fajro. Fine ni ekaŭdis la konatan tintilsonoron de nia starsledeto. Paĉjo venas!

”Etuloj, nun silentu, ĉar nun paĉjo estas ebria,” panjo diris kaj senbrue ni retiriĝis en la dometangulojn.

Paĉjo ne estis maliculo, sed bruo de liaj propraj idoj ne plaĉis al li, kiam li ebriiĝis. Panjo lumigis la lampeton sur la tablo kaj ĵetis iom da ligno en la fajron. Ni aŭdis la paŝojn de paĉjo sur la perono. Sed kiel rapide kaj firme li paŝas. Surprizitaj ni fiksrigardis al la pordo. Ĝi malfermiĝis kaj paĉjo envenis. Per unu mano li portis la brunan vojaĝsakon, kiu nun estis tiel plenplena, ke ĝi ŝajnis al mi kvazaŭ la bruna ĉevalino de la kamparano, kaj per la alia li portis la bareleton por brando.

”Eh, ĉu vi ne havigis kristarbon?” li gaje ekkriis.

”Ne, ni ja ne havus sufiĉe da mono,” panjo respondis mire rigardante lin.

”Nu, kompreneble ni havu kristarbon.”

Li metis la vojaĝsakon sur seĝon, malfermis la ŝrankegon kaj tien enĵetis la bareleton. Ĝi estis malplena ... kun daŭra kanta sono ĝi trafis poton. Poste li kunprenis la hakileton kaj eliris en la mallumon.

Nun ni ĝojkriis:

”Ni havos kristarbon ... kristarbon ni havos. ” Ni alproksimiĝis palponte la plenplenan sakon. Kion paĉjo povus havi en ĝi, ĉu?

Post kelkaj minutoj paĉjo revenas kun malgranda abisupro. Panjo alligas ŝnureton kaj oni pendigas ĝin ĉe la plafono super la tablo. Paĉjo alportas bombonojn, briletaĵon kaj kandeletojn kaj oni ornamas kaj lumigas la kristarbon. Ho, kiel bela ĝi estas! Tute kiel la lustro de la preĝejo, ni opiniis. Paĉjo daŭrigis la malplenigon de la sako vicigante sur la tablon buteron, fromaĝon kaj kolbason, longajn panbulojn kaj tritikbulkojn surŝutitajn per sukero, spickukfigurojn kaj kuketojn. Fine li elprenis tri pelvetojn el ligno, ruĝe lakitajn kaj orumitajn; el tiuj ni ricevis po unu kaj panjo ekhavis kaptukon el lana kvadratumita ŝtofo. Pro miro kaj feliĉo ŝi eĉ genuflekse riverencis.

Post kiam mia frato kaj mi vizitis la kamparanon por aĉeto de lakto, panjo surmetis la rizkaĉon kaj paĉjo rondodancis kun ni meze de la planko kantante per sia profunda bazo: "Kaj ree nun Kristnask' " kaj ankaŭ panjo, kun unu piedo sur la fajruja plataĵo, kunkantis. Sed kelkfoje ŝi forviŝis larmon per mana malantaŭo. Ŝi tiel ĝojis, kompatinda elturmentita panjo, kaj ĉio ja venis tre subite kaj neatendite, ne malpleje la bela kaptuko, kiu certe estas varmiga kaj bona por la vintro. Ŝi rigardis al ĝi kuŝanta sur ŝranketo kaj poste al paĉjo, denove kantante: "Kaj ree nun Kristnask'."

Ĝislaciĝe dancinte ni devis rigardi la belajn pelvetojn komparante ilin kaj gustumi la dolĉaĵojn kaj admirari la

pomojn, kiujn ni opiniis tiel ekstre bonkvalitaj, ke ni ne kuraĝis mordi en ilin. Jen ni ricevis rizokaĉon kun sukerro kaj cinamo kaj molajn buterpanojn kun fromaĝo kaj kolbaso, la fajro kraketis, estis varme kaj la kristarbo ĉion surbrilis. Neniam antaŭe oni festis tian feliĉan Kristnaskon en la ĉambreto de la malriĉa arbohakisto.

Dum mi poste, ree kuŝante sub la lanfelo, enrigardis la noktan mallumon, ŝajnis al mi, ke la brila stelo super la bruteja tegmento estas la kristnaska anĝelo malsupren ŝvebanta, kriante al la tuta mondo: "Jen mi venigas al vi bonan sciigon de granda ĝojo ..." Poste mi pensis pri mia bela pelveto staranta sur la ŝranketo, pri la granda pomo kaj pri tio, ke morgaŭ matene, kiam mi vekigos, panjo jam estos ellitiĝinta por lumigi la kristarbon kaj por regali nin en la lito per kafo kun sukerbulkoj kaj kukoj ... poste eble ni ricevos molajn buterpanojn kun fromaĝo kaj kolbaso, eble eĉ trinkos lakton kun ili. Kaj poste ... tiu penso ŝajnis la kulmino de la tuta feliĉo ... mi ree iros sur la deklivon por sciigi al Ture, ke ni tamen akiris kristarbon kaj ankaŭ ricevis tre belajn pelvetojn kaj sukeraĵojn kaj pomojn. Certe tio platpremos lin. Kaj jen mi ekdormis.

Tiu Kristnasko estis la lasta de mia patro. Apenaŭ tri monatojn poste, plorante, tremante pro malvarmo, mi staris apud la tombo, kie oni benis lin por la lasta ripozo.

Kio estis tio, kio igis mian patron rezigni sian intencitan festgajon, la brandon, por doni al la familio tiun kristnaskan feliĉon? Ne temas pri rezigno, vi diras, estis lia devo. Bone! Sed pripensu, ke temas pri tradicio eĉ de idolana tempo kaj ke liaj kamaradoj, certe atentantaj inviton al brandokafo, mokos lin. Ĉu eble okazis nur hazarde? Apenaŭ. Aŭ ĉu eble kristnaska anĝelo, kiun kortuŝis nia doloro, vizitis lin kaj apelaciis al liaj patraj sentoj? Kion li travivis la tutan longan tagon en la urbo? Mi ne scias kaj neniam ekscios.

De tiam pli ol kvardek jaroj pasis kaj grandan nombron da memorriĉaj Kristnaskoj mi travivis en mia propra hejmo, sed la plej fortan impreson tamen donis al mi la lasta Kristnasko de mia patro. Tiu festo restas mia plej bela memoro pri la malriĉa hejmo, kiun mi devis forlasi estante nur dekjara.

Olle Lindgren

El la sveda tradukis Signe Boye

Sinjoro kapitano

Jam de longa tempo miaj sonĝoj, same kiel la sonĝoj de ĉiuj homoj, ricevis novan, tute specialan aspekton. Ne plu estas vanaj vagadoj, fuĝaj nebuloj, kiuj sen senco kaj sen kaŭzo verŝiĝas unu en alian, ĝis fine ili disiĝas en nenion. Ne plu estas sonĝoj, kiujn oni matene gape ekvidas kun dormemaj okuloj, — kaj duone ride, duone kolere forsvingas: "La diablo forportu vin, de kie li pren- nis vin!" — kaj kiuj poste rikane krablas en abismon, kvazaŭ koboldoj, kiuj fruaŭrore kaŝas sin en arbaron. La sonĝoj, kiujn sonĝas mi kaj sonĝas vi, estas ombro de la vero; iliaj formoj estas ja terure troigitaj, tute strange kurbitaj kaj torditaj, sed la vero restas, vi tuj rekonas ĝin kaj via koro estas malĝoja.

Estis malvarmeta aŭtuna mateno, la nebuloj tiriĝis en la valoj kaj rampis laŭ la abruptaj montaj deklivoj, sur la pintoj jam blankis en la radioj de la frua aŭroro la unua neĝo, falinta nokte. La ĉielo estis klara; ĝi ankoraŭ memoris pri la nokta neĝo kaj la malvarmaj matenaj steloj, sed ĝi jam atendis la sunon.

Mi rigardis tra la fenestro; tiu fenestro ankoraŭ neniam estis lavita, tial mi vidis kvazaŭ tra vualo, sed mi tute klare vidis ĉion, kio okazis antaŭ mi; ankaŭ la voĉoj estis en la pura matena aero tiel klaraj, ke mi aŭdis kaj komprenis ĉiun vorton. La korto estis je unu colo kovrita per nigreca polvo, kiu dum la nokto ŝanĝiĝis en grasan ŝlimon; per la sama polvo estis kovritaj la barakaj tegmentoj kaj la velkaj folioj de juglando, kiu staris sola meze sur la korto; sub tiu juglando soldato tenis ĉe la bridilo selitan ĉevalon, kiu ĥenis kaj tremis pro malvarmo kaj malkvieto.

En longa, rekta vico staris la kompanio, preta jam tiun horon iri al la batalejo. Ili staris tie kvazaŭ ŝtoniĝintaj, neniun okulo tremis, la gracilaj korpoj estis iom kurbitaj pro la ŝarĝo de la pezaj dorsosakoj. Neniame antaŭe mi vidis sur unu sama malvasta loko tiom da juna beleco. Ĉiuj vizaĝoj estis ankoraŭ tre junecaj, preskaŭ infanaj kaj freŝaj, kvazaŭ lavitaj de aŭroro kaj roso; ankaŭ en la okuloj estis freŝa roso, ili rigardis kvazaŭ el foraj lokoj, el belaj sonĝoj; sed ĉiuj estis senmove direktitaj en sinjoron kapitanon, kiu paŝis malrapide kaj malzorge tien kaj reen antaŭ la silenta vico.

La kapitano estis tre altstatura, tutan kapon pli alta li estis ol la kompanio; li estis kovrita per malstreĉita nigra mantelo, sub kiu videblis paro da tre longaj kaj maldikaj kruroj; en la mano, kiu ankaŭ kun ganto estis

osteca kaj ungeca, li tenis bastonon, sur kiun li apogis sin dumire. Mi ne vidis lian vizaĝon, ĉar li estis la tutan tempon turnita al la vico. Paŝon post li iris juna standardisto, kiu kelkfoje time turnis sin, kiel eble turnas sin homo, kiu volas fuĝi, sed sentas, ke li estas senkomparte ĉenligita.

Ankoraŭ foje la kapitano ekrigardis dekomence. Li haltis antaŭ la unua numero en la vico, antaŭ alta, svelta junulo, kiu mirgapis al li per nigraj, obtuzaj okuloj. La kapitano stariĝis tuj antaŭ li.

”Kiel vi nomiĝas?”

La junulo diris sian nomon kaj tiam mia animo korduŝiĝis: mi ja konas vin, vi bela, juna knabo! Vi pensema, plenkore rigardanta en la estontecon! Viro inter kamaradoj, obeema infano inter saĝaj maljunuloj! Viva branĉo sur arbo; se oni forseĝus ĝin, la arbo mem estus vundita!

La kapitano pludemandis:

”Ĉu vi havas patron hejme?”

”Ne plu havas!”

”Kiom da gefratoj?”

”Ne havas!”

”Ĉu almenaŭ la patrino ankoraŭ vivas?”

”Patrinon mi havas!”

Kaj ekbrilis lumo en la obtuzaj okuloj.

Tiam la kapitano levis la bastonon, tuŝis per la ferumita pinto la bruston de la junulo kaj mansignis al la standardisto, kiu staris malantaŭ li. Tiu eltiris el la maniko notlibron kaj per tremanta mano skribis la nomon de la junulo. Kaj la junulo paliĝis.

La kapitano iris preter la dua kaj ne rigardis lin; li paŝis ĝis la tria kaj detale esploris lin. Tio estis gaja, babilema kaj laŭta junulo, konata kantanto kaj amato de junulinoj. Li havis sanan, rondan vizaĝon, ĉirkaŭ la malgrandaj oreloj volviĝis paro da tritikblondaj bukloj, la bluaj okuloj laŭte kantis, la malhele ruĝaj lipoj estis kurbitaj en agrabla rideto.

”Ĉu vi havas fianĉinon hejme?”

”Havas, sinjoro kapitano!”

Ankoraŭ pli laŭte kantis la bluaj okuloj, en la helan malproksimon atingis la kanto.

La kapitano levis la bastonon, la standardisto skribis. Kaj la kanto eksilentis en la bluaj okuloj.

Tiel paŝis la sinjoro kapitano malrapide laŭ la longa vico; li trarigardis, pridemandis kaj elektis. Kelkfoje li preterlasis du aŭ tri, iun li eĉ ne rigardis, kelkfoje li signis eĉ kvin aŭ ses laŭvice. Kaj ŝajnis al mi, ke li intence kaj pripense elektas la plej fortajn kaj belajn.

Li venis ĝis la fino, lastfoje li levis la bastonon, poste li turnis sin. Tiam mi vidis lian vizaĝon kaj mia koro eksilentis. Tiu vizaĝo estis sen haŭto kaj karno, anstataŭ

okuloj estis elfositaj en la kranio du profundaj kavaĵoj, longaj, akraj dentoj rikanis super nuda, fortika makzelo. La nomo de la kapitano estis Morto.

”Antaŭen ... marŝ!”

La kompanio subite turnis sin kaj ekiris per firmaj paŝoj suben en la nebulon. Antaŭ ĝi rajdis la sinjoro kapitano; alte super la nebulo leviĝis lia nigra mantelo. —

Ivan Cankar

El la slovena tradukis Franko Luin

Kamaradoj

Ĉu ankaŭ tiun ĉi nokton vi kuŝos en la fojnejo?” diris la edzinaĉo de la striglisto, kiam la edzo — zorge viŝinte sian kornan kuleron kaj metinte ĝin sur la tablon — malrapide stariĝis kaj prenis sian larĝrandan ĉapelon kiu pendis super la fera forno.

Kun momenta ekmiro li rigardis flanken.

”Jes, ja ... haum!”

Li kraĉis viraplombe kaj ŝajnis kvazaŭ neniu kontraŭdiro estus farebla.

“Ĉu do estas iu bovino, kiu naskos,” akre venis la demando.

”Jes, mi atendas, ke tion faros la granda blankkapa.”

”La blankkapa, jes certe!” la edzino ĵetis post lin. ”Diable rapidaj en sia naskado, la bovinoj, kiam oni devas kuŝi en la bovinejo seninterrompe dekkvar tagojn!”

Ŝi faris paŭzon, por ke la viro havu tempon por respondi, se li emus. Sed li ne emis. Liaj elstaraj moruokuloj nur simplanime rigardis antaŭen, dum li malrapide metis porcion da maĉtabako en la buŝon. Estis eviden-

te, ke nur por ne montri sin malamika li restis tiujn malmultajn minutojn en la ĉambro, kaj ke li sopiris eksteren.

La nigraj okuletoj de la edzino, kun subpremita indigno rigardis lin.

Ŝi havis senaniman ruĝan vizaĝon, kiu ŝajnis neniam moligita per la karesoj de infano kaj ŝia rapidparola kverela voĉo supozigis viglan labortakton kaj bataleman humoron.

Laŭ lia maniero sin movi estis ĉe la viro respektplena singardemo. Sara ja povas esti iom malfacila, jes ja, sed kiam temas pri bravaj virinoj, oni devas toleri la babilemon, opiniis Truls Jonason.

”Ne, certe ne temas pri bovinoj,” ŝi daŭrigis, ne ricevinte respondon, “sed certe estas aliaj artifikaĵoj. Ŝajnas al vi, ke mi tenas vin kaj vian hundaĉon en ordo, kaj pro tio estas por vi pli bone kuŝi kiel bruto inter la aliaj brutoj. Ĉar ordon vi timis kiel peston dum ĉiuj viaj tagoj, kaj se tiel ne estis, vi ja ne bezonus vivi kiel striglista stultulo tra tuta vivo, kiam vi havas sanajn brakojn kaj krurojn, kaj nenio malhelpis al vi fariĝi vokto aŭ stalestro. Sed estas, kiel mi diras: kiu estas kontenta sidi sur la balaĵejo, tiu ankaŭ devas tie sidi. Kaj se mi antaŭe povus imagi, ke mi devos fini miajn tagojn kiel edzino de striglistaĉo, tiam mi ja pli bone estus sciinta, kion fari! Sed ke mi estos edzino de tia strangulo, kiu eĉ ne povas loĝi

inter homoj, tion mi ja certe ne povus diveni! Mi povas veti, ke tio venis en vian kapon nur ĉar mi piedbate el-pelas vian hundaĉon. Kompreneble ŝajnas al vi, ke mi ne havas pli bonan okupon ol forbalai ĉion, kion ĝiaj kvar piedoj povas demeti, aŭ ĉasi la pulojn, kiujn ĝi postlasas ... La blankkapa bovino, vi diras — jes certe! Sed mi diros al la bienmastro, ke li havigu al si stalknabon, kiu povas kuŝi en la furaĝejo. Tian ili havas ĉe aliaj bienoj, kaj ni ja ne bezonas stari post la aliaj ĉi tie. Vi mem kompreneble ne havas parolkapablon, ke vi povas decide diri, kion vi volas?”

“Mi ne *volas* stalknabon por la bovinoj!” decide protestis la maljunulo. “Oni nur havus malagrablajojn pro li, kaj ĉiuokaze mi tamen mem devus ĉion atenti.”

“Ĉiuokaze! Oni sentas naŭzon aŭdante tiajn stultajojn. — Mem atenti? Ho, ho!”

“Jes! La lastajn noktojn Skerhusa-Peĉjo kaŝiris en la ĉirkaŭaĵo, kaj certe li ne havas bonajn intencojn, post kiam la bienmastro printempe elloĝigis lin el la farmeto, kion oni ja povas kompreni.”

“Ĉu tio vin koncernas?”

“Almenaŭ oni devas priatenti, ke ne okazas akcidento pro bruligo.”

“Ho, Jesuo — viraĉo vi estas!” kriis la edzino kun senlima malestimo.

Senrapide la maljunulo surmetis la ĉapelon kaj ŝovis la tabakujon en la poŝon. Ŝajnis al li, ke nun li aŭskultis tiom longe, kiom postulas la ĝentileco. Li prenis sian bastonon kaj eliris. Komprenoble sen adiaŭo; io tia nur estus konsiderata kiel nenecesa ĝentileco kaj estis evidente, ke la honesta sed iom idiota vizaĝo de Truls Jonason ricevis pli facilan kaj kontentan mienon, kiam estis fermita la pordo.

Ke li havis diable bravan edzinon, tion li sciis, kaj tion li ankaŭ volonte konfesis. Kusenojn kaj ilojn ŝi kapablis fari amase, neniam mankis sur la manĝotablo pano aŭ trinkaĵo, kaj neniam li devis malhavi en kion trempi la terpomojn; ĉiam plenplene. Kaj neniam kaŭzo por plendo, li estis prizorgata en ĉiu rilato. Sed tamen ... fremdulo li ĉiam sentis sin en la dometo. Estis kvazaŭ li estus tie pro kompatato kaj ĝuis ion, kion li ne meritas. Kaj reveni al la furaĝejo ĉiam estis por li konsolo. Estis ia sekureco fermi post si la du pordoklapojn, tiel ke krakis en la konstruaĵo, kaj scii, ke oni vere havas la rajton fari tion. Krome, tie estis tiel dolĉa varmo kaj kvieto, tute kiel en la plej ŝirmata domo, kaj kiel bonodoris la ĵus sekigita fojno kaj la vaporanta sterko. Jes — ne estas tiel stulta afero esti striglisto, ŝajnis al li — koncerne lin, li havis pli da plezuro per tio ol se li estus bienvokto kaj havus la okupon ĉirkaŭiri por kvereli kun la homoj, sed, jes ja, Sara devas havi ion pri kio kvereli, komprenoble.

Bruetis io en la pajlo de la furaĝejo. Estis Feltman — la gardohundo — kiu moviĝis. Kaj nun estis aŭdata kolerla sed duonsufokita grumblado. Kio estas al Feltman, kiu ĉiam kutimas silenti.

“Kio estas al vi?” diris la maljunulo kaj brupaŝe eniris la furaĝejon. “Kion vi vidas?”

Li parolis kvazaŭ al homa akompananto.

La hundo ne rigardis al li, ĝia atento ŝajnis direktita al la tero ĉe la muro, aŭ eble al io, kio ekstere moviĝas, kaj ĝia hararo stariĝis laŭ la dorso. Kaj denove ĝi kolere kaj insideme murmuris, sonis kvazaŭ ĝi tenus la buŝon en barelo. Kiam ĝia mastro karese frapetis ĝian kapon, ĝia lupa mieno aliiĝis kaj ricevis varman kaj sindonan esprimon, dum ĝi dorsen klinis la orelojn kaj svingis la voston. Sed jen ĝi denove hirtigis la harojn, apogis unu piedon kontraŭ la muro, kvazaŭ ĝi volus elrigardi tra la malgranda fenestro, kiun tamen ĝi ne atingis.

La striglisto prenis la bastonegon, kiun li antaŭe formetis, trairis la furaĝejon kaj malfermis la supran parton de la pordo, sin elstreĉis kaj rigardis ambaŭflanken, sed vidis nenion.

Feltman grumpletante staris ĉe liaj piedoj.

”Nu, do ataku!” ĝia mastro diris kaj malfermis ankaŭ la malsupran parton de la pordo, sed tion Feltman ne atentis. Ne apartenas al ĝia devo io alia ol ataki la bo-

vinojn, kaj ili trankvile staris en la stalfakoj. La mastro mem ja povas iri, se li emas.

“Ĉu iu tie?” raŭke kriis la maljunulo. Se estis ŝtelisto aŭ alia malbonfaranto en la proksimo, li almenaŭ ne respondis.

Dum momento la maljunulo intencis eliri por esplori la aferon, sed poste li pensis, ke nur estas la fianĉo de iu el la servistinoj, kiu vagadas ĉirkaŭ la domanguloj. Kaj tio ja ne koncernas lin.

Li eniris kaj fermis ambaŭ pordojn, ekfajfis al la hundo, kiu ankoraŭ flaresplorante staris ĉe la pordfendeto, kaj ambaŭ eniris la furaĝejon por kuŝiĝi.

*

El du anguloj de la granda konstruaĵo la fajro disvastiĝis. La flamoj etendiĝis kaj kreskis, malleviĝis kvazaŭ por ĉerpi novajn fortojn, leviĝis denove, semadis rapidajn saltantajn flametojn laŭ la sekaj ŝindotegmentoj, kunfluis en grandajn flagrantajn faskojn, kiuj jen renkontiĝis el ambaŭ flankoj kvazaŭ en longe sopiratan kuniĝon.

Neniu sono en la nokta silento krom tiu nelaŭta muĝeto simila al la paso de la vento tra arbaro; plue malforta skrapado kvazaŭ de grandaj ratoj, kaj de temp'al tempo ekkrako de salona fusilo. Sed subite venis bojado de hundo, tirata unufoje, dufoje, kaj jen senespera krio: "Brulego, brulego!" unue de unu voĉo, poste de pluraj.

Tintado de frakasitaj fenestroj tranĉis la fajran bruegon kaj duonfrenezaj figuroj kun minimumo da vestoj surkorpe elkuris en la liberan aeron.

El la vilaĝo aŭdiĝis la malmola sono de la fajrokorno, sed ankoraŭ nenies mano leviĝis al batalo kontraŭ la dezertigo; ĉiu pensis nur pri sia propraĵo. Jen venis bien-servisto kun plenbrako da vestoj, jen ploreganta servis-tino kun la lastnaskito de la gemastroj sur la brakoj, la bienmastro mem helpata de du viroj eltrenis la monkestegon kun la valorpaperoj de la bieno.

Simile al giganta brulŝtiparo la fajro lumigis la senstelan nokton, la fumo peze turniĝis al la malventa flanko, forruliĝis malrapide, maldensiĝis en hele grizajn flokojn kaj fine malaperis en la mallumo de la altebenaĵo. De temp'al tempo ĝi teren ĵetis blankan brilon, kvazaŭ la tero estus kovrita per neĝo, kaj de ĉiu objekto tiriĝas longaj, fantomaj ombroj, kiuj neniam estis senmovaj.

Grupo da plorantaj infanoj kolektiĝis ĉirkaŭ maldika virina figuro envolvita en kovrilo; de la vojo proksimiĝis la bruoj de furioza ĉevaltrotado kaj de akvobareloj.

Ĉe la bieno kvazaŭ interne de la flamoj, sonis la konfuzo la unutona senĉesa bojado de la gardohundo. Kelkaj bovinoj galope elvenis, disiĝis, ĉirkaŭkuris ĉiu al sia flanko kaj rekuregis kvazaŭ per komuna impresoj — en la konstruaĵon.

Nun rapide alvenis la unua fajropumpilo al la loko kaj la pumpilista estro desaltis.

”Krimbruligo,” li nur diris, pormomente ĉirkaŭrigardis kaj aldonis: ”La magazeno povas esti savota.”

Altorentis homoj kaj veturiloj el la najbaraj vilaĝoj, ĉiuj manoj estis pretaj, kaj la laboro koncentriĝis ĉirkaŭ la loĝodomo kaj la granda magazeno.

Sed de la bovinejo sonis tra la muĝego de la fajro la bojoj de la gardohundo, kriaĵ komandovortoj kaj la krakado de rompataj tabulegoj kaj la alkroĉo de la hakstangoj. Estis Feltman, kiu kun sia mastro laboris por savi la posedaĵon al ili konfiditan. Kaj tio estis peza laboro.

Frenezaj pro timo la bovinoj kuris en la stalon. Kelkaj viroj alvenis por helpi, sed tie sur la nuda ebenejo estis neeble kune teni la sovaĝajn bestojn, kiuj galopis ĉiudirekten kaj per ĉiuj fortoj nur provis enkuri en la fajron.

”Tiamaniere ni ne sukcesos! Sed alportu latojn kaj tabulojn por ĉirkaŭbari ilin! Dume Feltman kaj mi mem helpos al ni,” kriis la striglisto, kiu vokis al la bovinoj aŭ instigis la hundon kaj ĉirkaŭkuris vestita per mallonga ŝafa pelto super nura ĉemizo, feltĉapelo kaj paro da grandaj lignoŝuoj. Sub la pelto flirtis la ĉemizo kiel malferme alligita velpeco, ne donante ŝirmon al la senkarnaj kruroj de la posedanto. Sed neniu trovis ion strangan en tiu ridinda tualetaranĝo, almenaŭ ne Truls Jonason mem.

Feltman kaj li dividis inter si la laboron. La striglisto elpelis la bestojn, unuope ili kuniĝis iom post iom kun la fermita aro, kiun Feltman ĉiam rondkurante kaj bojektante kuntenis, por plia instigo ekmordante voston aŭ postkruron, kie li nur atingis. La bovinoj — rekonante lian leĝan superecon — ne kontraŭstaris; ili nur sin kunpremis kun la kapoj alinterne kaj la vosto direktitaj al sia turmentanto.

Kun malrespekto al la danĝero, laŭdinda jam se temus pri homaj estaĵoj, la striglisto ĉiam ree kuris en la bovinejon por elpeli pli kaj pli da kontraŭemaj brutoj: la aro fariĝis ĉiam pli granda, kaj Feltman devis ĉirkaŭkuri pli vaste.

”Eltenu, Feltman! Mordu! Ataku ilin!” sonis la eluzita voĉo de la maljunulo, kaj ”haŭ, haŭ, haŭ,” estis la unutona, devofidela respondo.

Sur la kampo, en la proksimo de la brutaro, kolektiĝis kelkaj virinoj, parte la edzinoj de la bienlaboristoj, parte scivoluloj venintaj el la vilaĝo; kaj la mezpunkto de tiu jen ĝemanta jen babilanta aro estis la edzino de la bienposedanto, ĉirkaŭata de la timigitaj, duonvestitaj infanoj.

La striglisto sukcesis, kiel ŝajnis al li, kolekti la brutaron plennombre, kaj nun li staris nudkrura en la vento, tenante per unu mano la felbĉapelon, per la alia al si markante en la aero la nombron.

Fariĝis maltrankvilo en la virinaro, sed tion li ne rimarkis; li estis plene okupita de siaj propraj aferoj.

”Emil!” kriis malespera voĉo. ”Mi perdis Emilon! ... Ĉu mi ne kunprenis lin el la domo? Li ja estis ĉi tie ... Emil! — Mi frenezigās — helpu ... Ĉu li ne elvenis?”

Multvoĉa babilado por kaj kontraŭ. Iuj vidis lin, aliaj ne.

La maldika estaĵo en la ruĝa litkovrilo alkuris al la striglisto; mano metiĝis sur lian ŝultron kaj skuis lin.

”Emil malaperis. Serĉu lin! ... Helpu al mi, Truls Jonason! ... En la infanĉambro ... Serĉu lin, mi diras! Ŝajnis, ke li kunestis ... mi forgesis lin ... li dormas.”

La diro finiĝis en plorkrio, kiu penetris ĝis la vostoj. Sed la striglisto nur flankenrigardis, spiritforesta, kvazaŭ li ne komprenus aŭ indiferece kvazaŭ temus pri pepo de rato, kaj per sia etendita montrofigro li daŭrigis la nombradon: ”Tridek unu, tridek du, tridek tri ...”

Subite li interrompis, li gestadis en la aero kiel frenezulo.

”La virbovo! La virbovo!” li kriis. ”Mi ja sciis, ke io mankas! Jesuo — la virbovo mortbrulos!”

”Estas absolute neeble eligi lin nun,” konstatis unu el la viroj, kiu venis kun plenbrako da barillatoj.

”Tenu ilin kune,” estis la respondo de la maljunulo, kaj li ekkuris, kriante al Feltman, ke ĝi sekvu.

”Sed Truls! Sed Truls, kion vi pensas?” kriis el la virinamaso akresona kaj bone ekzercita voĉo. ”Vi ja estas freneza. Lasu!”

Sed Truls nur kuris — kuris tiel, ke la pezaj lignoŝuoj igis la teron resonegi kaj estis miraklo, ke ne rompiĝis la kruroj.

Lia edzino tamen ne inklinis lasi lin riski la vivon pro la virbovo. Ŝi ekkuris, ankaŭ ŝi, tiel rapide kiel ŝi kapablis, ke la kaptuko glitis sur la ŝultrojn kaj la vilaj hartufoj stariĝis kontraŭ la vento.

”Sed — ĉu vere vi estas freneza?” ŝi senspire kriis, kiam ŝi ekkaptis lin:

”Lasu min — virinaĉo,” krude respondis la maljunulo.

Nun ne estis tempo por konsideroj.

”Truls, pro Dio ne faru tion!”

Tiu voĉo tamen povis angore petegi, kvankam akra kaj kruda.

”Fermu la buŝon — lasu min!”

”Ĉi tie vi restos!”

”Por ĉiuj diabloj — ne!!” Kun tiu iom neĝenita certigo al la edzino, li sin forŝiris tiel forte, ke kraketis la pelto, kaj malaperis poste kun Feltman en la bovinejon.

La edzino purigis la nazon, viŝis ĝin per la jupo kaj reiris al la aliaj virinoj, sed tie regis tiel granda ĝojo pro Emil, ke neniu havis tempon por ŝi.

La multpromesa junulo estis retrovita, sidanta en maljungita veturilo, kie li ludis, ke li estas estingilisto kaj per ĉiuj fortoj vipadis paron da imagitaj ĉevaloj.

La edzino de la striglisto sidiĝis sur la tero, tirante la jupon super la kapon por ŝirmi sin kontraŭ la vento, kaj fikse rigardis la brulantan stalon, dum ŝi lulis sin antaŭen kaj reen, firme interplektante la manojn kaj senĉese murmurante al si mem la "Pekkonfeson" ne sciante kion ŝi faras, nur kun la sento, ke ŝi estas kulpa pri ĉio ĉi, kaj ke ŝi devas rapidi por kompatigi Nian Sinjoron ke li helpu — rapidu helpi ... helpi, antaŭ ol estos tro malfrue!

Kaj tiam — dum ŝi murmuris la vortojn ree kaj ree kaj kunpremismanojn — ŝi ekvidis kiel la virbovo kaj Feltman elkuregis, kaj post ili la maljuna Truls, sen ĉapelo kaj frotante la kapon kaj la pelton por estingi ĉiujn fajrerojn. Kaj je tiu vido ŝi denove ekploris, per torentaj larmoj kiel pluvego, kaj pli fervore ol iam antaŭe ŝi murmuris la "Pekkonfeson," ĉar nun Nia Sinjoro montris sin bona kaj nun ŝi volis fari ion kio plaĉas al li. Pro tio ŝi restis sidante kun la manoj kunplektitaj kaj kun sia "ke mi multege pekadis per ..." dum Truls reiris al la brutaro kun la virbovo kaj Feltman.

Susuris kaj kraketis tie en la brutejo, kaj ĉevronoj disfalis, kaj alta fajrofasko leviĝis ĉielen. La striglisto eĉ ne

rigardis tien. Li sciis, ke ĉiujn siajn li havas en sendanĝereco, kaj li komencis helpi ĉe la konstruo de la barilo.

Li vidis la edzinon foriri tra la kampo.

”Sara, vi! — Alportu pantalonon al mi!”

”Ĝuste kion mi faros!” ŝi kriis responde kun ordinara sekeco.

Sammomente venis al la maljunulo la bienmastro en akompano de kelkaj fremdaj sinjoroj. Lia rigardo glitis sur la brutaron kaj ŝajnis fari proksimuman kalkulon.

”Ĉu ĉiuj savitaj?” li diris kun ioma hezitado, kvazaŭ estus tro malfacile kredi tion.

”Jes — ĉiuj escepte de la bovidoj. Estis neeble por mi eniri en la apartojn.”

”Kaj ja estis ĝuste en tiu angulo, ĉe la furaĝejo, kie la fajro ekflamis.”

”Jes, se mi ne havus la helpon de Feltman, certe multaj ankoraŭ restus tie,” diris patro Truls kun voĉo iomete tremanta pro la nokta frosto.

”Tion ĉi Truls Jonason faris kiel bravulo, kaj vi povas esti certa, ke mi memoros vin pro tio.”

”La diablo min prenu, se estis mi. Estis ja la hundo. Tiam hundon mi neniam vidis. Li havas, certe, homan prudenton, mi ĵuras tion.”

”Jes — maljuna kaj fidinda ĝi estas.”

”Fidinda? Hm! ... Ŝajnas al mi, ke oni intencis mortpafi ĝin en la pasinta printempo, ĉar ĝi estis tro maljuna, oni diris.”

Estis sufiĉe da malico en la parolo, kaj ne malfacile estis diveni, kiu estis parolinta pri Feltman.

”Mi havigos novan gardhundon, nur por ke Feltman havu ripozon, kaj ĝi rajtos vivi ĝis pro aĝo ĝi mortos.”

”Jes, sed kiel nova kaj juna tiu estas, je mia vivo, neniam ĝi fariĝos kia Feltman estis,” venis la respondo kun nebonigebla maljunula obstino, kaj du el la sinjoroj puŝetis unu la alian per la kubutoj, kaŝe ridetante pri la bataleto inter mastro kaj servisto.

Feltman duonkuŝis sur la tero kaj tusadis grimancante kaj faris la plej strangajn kurbiĝojn per la lango, kvazaŭ ĝi vane provus kraĉotusi kiel homo. Estis rimarkeble, kian sekon ĝi sentas en la gorĝo, nun, poste.

La servistino, kiu ĉirkaŭportis brandon al la fajroestingistoj, venis al la maljunulo por ankaŭ al li doni refreŝigan trinkaĵon.

Li viŝis sian buŝon per la maniko kaj prenis la glason.

”Ne gravas al mi,” li diris, ”pli malbone al la kompatinda hundo!”

Kaj li trinkis la brandon kun rimarkebla bedaŭro, ke li ne povis dividi la refreŝigon ankaŭ kun sia laborkamarado.

”Ĉu certe vi ne havas siteleton por pruntedoni al mi?” li diris al la servistino.

”Ne, ĉiujn ili havas por la akvotransportado.”

”Jes ja, ian rimedon ni certe trovos. — Dankon por la trinkaĵo.”

Kaj la servistino foriris.

Truls Jonason penseme paŝis trans la barilon al la bovinoj, deprenis unu sian lignoŝuon kaj melkis kelkajn gutojn en ĝin, prenis malplenen da herbo kaj bone purigis la ŝuon, kaj post kiam tio estis farita, li melkis ĝin tiel plena, ke la ŝaŭmo fluis ĉe la rando, poste li singarde transpaŝis la barilon kaj metis la trinkaĵon antaŭ sian vilan amikon, kiu tuj stariĝis kaj komencis lektrinki, tiel vipante per sia longa lango, ke la lakto ŝprucis ĉirkaŭ ĝia buŝo.

”Bone por la skeleto, ĉu ne?” kontente diris la maljunulo, kiu ege ĝuis de tio, kiel bongustis al la hundo.

*

Estis frumatena diservo en la Kristnaska tago, kaj la preĝejvizitantoj venis en pli-malpli grandaj grupoj supren al la altaĵeto, dum parto ariĝis post la kradpordo aŭ sur la muro por kapti okazon de iometa babilado en la frua mateno. Surtere kuŝis maldika neĝotavolo kaj el la altaj fenestroj brilis kun milde travidebla klareco.

Odoris de la ĵushakitaj abibrancetoj eĉ ĝis la altaĵeto laŭlonge de la preĝeja vojo al la ĉefvojo.

En la sakristio staris la sakristiano por gardi la pordon, pli gravmiena ol ordinare, zorge kontrolante, por ke neniu senrajta eniru tiun ĉi vojon, kiun rajtas uzi nur kelkaj, la plej eminentaj el la paroĥanoj, kies loko estis tie supre ĉe la ĉefaltaro, kaj ĉiufoje, kiam malfermiĝis tiu pordo, torento de lumo elfluis en la grizan matenkrepuskon.

Jen, tuj apud la pordo — sin retirante for de la lumstrio ĉiufoje, kiam tiu volis kapti lin, sed ĵetante longan rigardon en la ĉambron post ĉiu, kiu eniris — staris sola maljuna viro kun hundo apud si.

La longa vizaĝo kun sia nazego kaj siaj moruokuloj aspektis ankoraŭ pli honesta ol ĝenerale — purlavita, razita pro la festo, kaj plie stampita de iu interna maltrankvilo, kiu faris ĝin pli esprimplena ol ĝi kutime estis.

Tie li staris — la maljuna honesta Truls Jonason kaj pensis, ke tiun ĉi fojon estos lia volo, kiu regos. Sian vivon li volus riski por tio; kaj li tiel ruze aranĝis, ke la edzino devis eniri tra la granda ĉefenirejo kune kun la cetera publiko, dum li mem eniras tra la sakristio. Li nenion pli bezonis fari, ol aludi al la edzino, ke oni sciigis al li, ke tia aranĝo estis la kutimo en similaj okazoj; ĉar, kvankam ofte tre naiva, la maljunulo Truls tamen sciis,

ke tian argumenton neniu virino povas kontraŭstari, eĉ se ŝi estus pli batalema ol Sara mem.

Jen la kaŭzo, ke li kaj Feltman — tute en paco kaj neri-markitaj — staris ĉi tie, dum pleniĝis la preĝejo.

Sed nun tamen proksimiĝas la tempo, kiam komenciĝos la diservo, kaj la pastro povas veni ĉiumomente.

Nun li devas ekagi.

Ŝajne eĉ Feltman havis senton de la maltrankvilo de sia mastro, ĉar teren malleviĝis la vosto kaj dorsen ligiĝis la oreloj.

La maljunulo kraĉotusis, rektigis la nefiksan kolumon, metis la grandan himnolibron sub la maldekstran brakon, kraĉotusis denove, provis surpreni bravan mienon, kaj poste li frapis la pordon — ne per kurba fingro kiel faras ordinara homo, sed per la fingraj suproj, tiel ke aŭdiĝis kvazaŭ farita de bestopiedo.

La sakristiano elrigardis, iom surprizita.

Truls Jonason estis sin retirinta kaj el la ombro, en kiu li staris, li faris multajn mistikajn mansignojn kaj signalojn. La sakristiano aspektis ankoraŭ pli surprizita, sed li tamen malsupreniris la ŝtuparon dum li fermiĝis la pordon post si.

”Ha — ĉu Truls Jonason!” li diris, kiam li rekonis la maljunulon. ”Jes, kompreneble vi eniros tiun ĉi vojon. Vi, kiu hodiaŭ estos honorata antaŭ la tuta preĝeja publiko!”

”Jes ja — hm.”

La novrazita maljunulo levis la dekstran manon al la mentono, antaŭenŝovis la lipojn, rigardante sian botpinton, kiun li levis supren. Li aspektis meditema.

”Nur estas pri mia hundo. Tiu ĉi hundo — Feltman — hm.”

”Jes, ĝin ni certe hejmenigos,” la sakristiano decideme diris, kvazaŭ ĉiuj malfacilaĵoj poste estus for; kaj por montri sian pretecon, li rapide kliniĝis kvazaŭ por preni ŝtonon.

”Ho, se estos tiel, ambaŭ ni povas reiri,” ekscitiĝe diris Truls Jonason, dum la mentono tremis inter la senfiksa kolumo.

”Kion vi volas per tio, Truls Jonason?”

”Mi — hm — mi volas nenion,” diris la maljunulo, hontanta pro sia nepripensemo.

”Certe estis io?”

Temas ja pri: — nun aŭ neniam! Tial venis:

”Mi miras, ĉu estas eble por mi kunpreni la hundon?”

”La hundon? En la preĝejon? Ne, tio neniam povus okazi!”

Fariĝis prema paŭzo.

Feltman aspektis hontanta, ĝi premis sin al la kruroj de sia mastro kaj similis al ŝafido kvankam ĝi havis felon kiel lupon. Tia situacio ne estis laŭ ĝiaj spertoj. Ĝi ne povis kompreni, kial ĝi devas atendi antaŭ tiu granda

domo kaj kial ne odoras de bovinoj kaj kial oni rigardas al ĝi kvazaŭ ĝi estus farinta ion malbonan.

”Ĝi estas same prudenta kiel homo,” la maljunulo diris kun certeco.

Denove fariĝis silento.

”Estis li, kiu savis ĉiujn bovinojn de la bienmastro ĉe la granda brulo,” li aldiris.

Estis delikata afero. La sakristiano gratis la nukharojn. Ŝajne la maljunulo intencis persisti. Sed kiu iam aŭdis pri hundo, kiu vizitas preĝejon?

”Kaj mi garantias pri tio, ke almenaŭ li bridos sian buŝaĉon.”

Truls Jonason nenian malbonon celis per sia malbela esprimo. Li nur volis diri, ke tiurilate estis por li multe pli facile havi la respondecon por sia hundo ol por sia edzino.

Feltman aspektis kiel vera konfirmo de la diraĵo de sia sinjoro; la sakristiano ĵetis ekzamenan rigardon al ĝi.

”Ni aŭskultu, kion diros la paroĥestro, tie li venas.” Feltman kaj ĝia mastro respekte sin retenis, sed la sakristiano restis sur la ŝtuparo.

”Jen Truls Jonason, li, kiu havos medalon hodiaŭ; kaj li volas kunpreni la hundon en la preĝejon, sed kompreneble tio ne povas okazi?” li diris post kiam li salutis.

”Hundo? Ne, kara Truls Jonasson, tion oni ne povas,” la paroĥestro diris kaj ridetis indulgeme.

”Eĉ vermon ĝi ne ĝenas.”

”Sed oni ne kutimas kunhavi hundon en la preĝejon.” Precize sama argumento, kiun Truls Jonason mem uzis, sed supozeble al li ŝajnis, ke la regulo ne validu virojn inter si, ĉar kun la tuta persistemo de ebenano li restis ĉe sia opinio:

”Ĝi absolute nenion diros.”

Feltman aspektis tiel sensenca, ke oni devis konsideri ĝin monstre kapabla sin aliŝajniki, se tamen ĝi havas malbonan intencon.

”Jes, sed ĝuste en la Kristnaska tago! Ne, kara Truls Jonason, tio ne povas okazi.”

”Jes, sed absolute mi ne staros tie por ricevi dankon kaj laŭdon, kiam estas ĝi kiu faris tion! Al mi do indiferentas ankaŭ la medalo.”

”Ne povas esti via intenco ĉion forlasi?”

Truls Jonason haltis kaj turniĝis.

”Ĉu kapti min ili povas?” li diris.

Li celis la policistojn.

”Kompreneble ne!” la pastro respondis, surprizita pro tia demando.

”Nu, iu alia prenu la medalon, mi ne volas ĝin.” La maljunulo ekiris, kaj Feltman kunsekvis, eĉ ne bezona-

te voki al ĝi per fajfo: ĝi ne havis ŝaton al pastraro kaj eklezio.

”Alkuru lin kaj diru, ke li rajtas kunpreni la hundon, kondiĉe ke li kaŝas ĝin post la benkoj kaj respondas pri ĝi.”

La sakristiano obeis, kaj la duo reiris.

Truls Jonason singardeme pasis tra la sakristio akompanata de sia kvarpieda kamarado, kiu iris tiel proksime al li, ke ĝi senĉese per siaj piedoj surtretis liajn kalkanojn.

La loko de la maljunulo estis en la absido, por ke li estu proksima al la altaro, kiam la solena momento komenciĝas.

Li sidiĝis sur la plej ekstera flanko de la lasta benko, kie oni — konsiderante ke li estas, por tiel diri, honora gasto — lasis al li tiel larĝan sidlokon ke ĝi povus esti sufiĉa eĉ por katedrala preposto. Ankaŭ Feltman sidiĝis sur la plata ŝtonplanko, sin premante al la muro, kaj tuj apude al sia sinjoro. Ne estis ebla pli bona konduto ol tiu de Feltman; eĉ la movo per kiu ĝi turnis sin kaj retiris la voston, kiam iu preteriris, ŝajnis peti: pardonon al mi!

Kaj la paroĥestro kaj la sakristiano fariĝis tute trankvilaj koncerne al ĝi, kaj la diservo neĝenite pasis.

Nur kiam oni devis stariĝi dum la legado de la evangelio okazis, ke la maljunulo metis la piedon sur la piedon de sia amiko.

”Aj!” kriis Feltman kun tre akra sed tre bonmaniera hundvoĉo, kaj ĝian mastron trafis riproĉa rigardo de la sakristiano. Al Feltman, kies konscienco ŝajne riproĉis al ĝi pro la malbona konduto, oni permesis resti.

Post la diservo la paroĥestro parolis al servistoj kaj mastroj, alpaŝis la altaron kaj alvokis ”la strigliston Truls Jonason, al kiu la societo Pro Patria donacas sian grandan arĝentan medalon pro longedaŭra kaj fidela servado”. Kaj la maljuna Truls obeis la alvokon, samtempe hontema kaj fiera, la publiko bruegis, amasiĝis kaj streĉis la kolon por povi vidi lin, kaj tie li staris antaŭ la altaro.

La belajn vortojn kaj Pro Patria’n kaj ĉion ceteran li ne komprenis, sed tion li komprenis, ke estis por li honora tago kaj ke Feltman kunestas, kaj ke fine Sara spertis, ke tamen oni povas esti konsiderata kiel reputaciulo, kvankam nur striglisto oni estas, kaj li estis ĝoja, ke sola li ne estas tie sur la preĝeja planko antaŭ la tuta publiko; li sentas iun, kiu premas sin al lia genuo, iun varman kaj molan. Ian neklaran penson li ankaŭ havis pri kverelo kaj severeco, kaj varmigan memoron pri la kvietiga grenejo kaj malvarma bestnazo, kiu serĉfosis post lia orelo en la plej trankvila kaj fidela amikeco, kaj la rigidaj moruokuloj estis larmoplenaj, kiam la paroĥestro metis la blankan medalon sur la malhele bluan trikitan jakon

el simpla drapo, kaj neniu povis diri, ke la konduto de Feltman estis alia ol deca.

Ĝia mastro ne rigardis al ĝi, eĉ ne karesfrapis la hirtan kapon, griziĝintan en la laboro same kiel la lia. sed li sentis ĝin alpremita al sia dekstra kruro — konfidoplene kaj bonkonate. Neniu homo havis ion por kritiki. Truls Jonason kaj lia hundo, ili apartenas unu al la alia, oni opiniis. Jes, maljuna fraŭlino, kiu posedis tri mopsojn sed neniujn infanojn, plorĝemis en la naztuko ĉe tiu vido. Ĉar tio estis io, kion ŝi komprenis.

Kaj kiam Truls Jonason reiris, li estis gratulata de la eminentularo, manpremata kaj devis riverenci, kaj kiam la orgeno ekludis, la homoj elfluis el la preĝejo, kaj la du malaperis tra la sakristio.

Kio poste sekvis kaj okazis inter Truls kaj lia edzino, pri tio la historio nenion rakontas, sed oni povas supozi, ke li diris al ŝi, ke kiam striglisto ricevas medalon, estas kutimo, ke li kunhavas sian hundon en la preĝejo.

Viktoria Benedictsson

El la sveda tradukis Bernhard Eriksson

La puphejmo

Ili estis geedzoj de post ses jaroj, sed ili kondukis kvazaŭ gefianĉoj. Li estis kapitano ĉe la militŝiparo kaj partoprenis ekspedicion dum kelkaj monatoj ĉiusomere kaj dufoje li faris longan vojaĝon. Tiuj etaj ekspedicioj faris bonon, ĉar se dum la vintra hejmsidado montriĝis signoj de malfreŝeco, tia somervojaĝo refreŝigis la rilaton. La unua somervojaĝo estis malfacila! Tiam li skribis verajn amleterojn al sia edzino, kaj li ne povis renkonti velŝipon sur la maro antaŭ ol li tuj signalis: poŝto! Kaj kiam li fine ekhavis tersenton de la svedaj ŝeroj, li ne sciis, kiel li plej baldaŭ ekvidos ŝin. Sed tion ŝi sciis. Apud Landsort li ricevis telegramon, ke ŝi renkontos lin ĉe la insulo Dalarö. Kaj do, kiam malleviĝis la ankro antaŭ la insuleto Jutholmen, kaj li vidis bluan naztuketon en la verando de la gastejo, tiam li sciis, ke estas ŝi. Sed enŝipe estis tiom da farendaĵoj kaj vesperiĝis, antaŭ ol li povis alboridiĝi. Tamen, kiam li alvenis en la boato kaj la hokstango ekpuŝis la ponton kaj li vidis ŝin tie, same juna, same bela, same sana, tiam ŝajnis al li, kvazaŭ li ree

travivas la postedziĝajn tagojn. Kaj kiam ili venis en la gastejon, kian vespermanĝeton ŝi lerte aranĝigis en la ĉambroj de ŝi menditaj! Kaj kiel multe restis al ili por priparoli! Pri la vojaĝo, pri la etuloj, pri la estonto! La vino brilegis kaj la kisoj ŝmacis kaj aŭdiĝis la vesper-signaloj el la rivero. Sed tio ne koncernis lin, li ne devis ekiri pli frue ol je la unua. Kiel? Ĉu li iros?

—Jes, li devas kuŝi enŝipe, sed se li nur estos hejme je la veksignaloj, estos bone!

—Je kioma horo estas la veksignaloj?

—Je la kvina!

—Ho, kiel frue!

—Sed kie ŝi loĝos ĉi nokte?

—Tion li ne eksciis!

Li divenis tion, kaj volis vidi, kie ŝi loĝas. Sed ŝi ekstaris antaŭ la pordo! Li kisis ŝin kaj sidigis ŝin sur sian brakon kiel infanon, kaj tiel li malfermis la pordon.

—Ho, kia granda lito! Kvazaŭ militŝipo! De kie ĝi venis?

Ho Dio, kiel ŝi ruĝiĝis. Sed ŝi ja komprenis de liaj leteroj, ke ili loĝos en la gastejo.

—Jes, certe ili loĝos tie, sed li devas esti enŝipe je la veksignaloj, tiu damna matenpreĝo, kiu same bone povus esti preterlasata.

—Fi, kiel li parolas!

—Nun ni havu kafon kaj fajreton, ĉar la litotukoj ŝajnas malseketaj!

—Kia saĝa ruzulineto estas ŝi, kiu havigis tian grandan liton! De kie ŝi havigis ĝin?

—Ŝi tute ne havigis ĝin!

—Ne, tion li certe kredu! Kiom li kredas tion!

—Li estas tiel stulta!

—Ĉu li estas stulta? Kaj li ĉirkaŭprenis ŝian talion.

—Ne, li estu bonkonduta!

—Bonkonduta; ja estas facile diri!

—Nun venas la servistino kun la bruloligno!

Kiam sonis la dua horo kaj la matenruĝo ekflamis oriente super ŝeroj kaj akvo, ili estis sidantaj ĉe la malfermita fenestro. Ŝajnis kvazaŭ ŝi estas lia amantino kaj li ŝia amanto. Ĉu ne? Kaj nun li foriros de ŝi! Sed li revenos je la deka al la matenmanĝo, kaj poste ili veturos. Li faris kafon per sia kafkuirilo porvojaĝa kaj ili trinkis kafon dum sunleviĝo kaj mevokrioj. Tie sur la akvo kuŝis la kanonŝipo, li vidis iafoje ekbrilojn de la hakarmilo de la antaŭkila postenanto. Estis malfacile disiĝi, sed agrable senti, ke oni tiel baldaŭ renkontiĝos. Kaj li kisis ŝin por la lasta fojo, fiksitis la sabron ĉe sia talio kaj ekiris. Kiam li venis sur la ponton kaj kriis: Ŝipo hola! ŝi kaŝis sin malantaŭ la kurtenon kvazaŭ hontante. Sed li ĵetis mankisojn per ambaŭ manoj ĝis la maristoj alvenis kun la boato. Fine unu lasta: "dormu bone kaj songu pri mi,"

kaj kiam li meze sur la akvo sin turnante metis la lornon al siaj okuloj, li vidis malgrandan estaĵon nigraĥaran en la ĉambro; la suno brilis sur ŝiaj ĉemizoj kaj nudaj ŝultroj kaj ŝi aspektis kvazaŭ marvirineto!

Sonis la veksignalo. La longaj sonoj de la signalkorno ruliĝis inter verdaj insuloj trans la rebrilan akvon kaj revenis malantaŭ la picearbaroj sur aliaj vojoj. Nun "ĉiuj viroj ferdeken" kaj "Patro nia" kaj "Jesu', ni komencu ĉiam". La malgranda sonorilejo sur Dalarö respondis per eta sonorado, ĉar estis dimanĉmateno. Kaj nun en la matena venteto venis kutroj kaj flagoj flirtis, septoj klakis, belaj somervestoj neklare ekvidiĝis sur la doganponto, la vaporŝipo kun la ruĝa akvolimo alvenis de la insulo Utö, la fiŝistoj elakvigis siajn retojn kaj sur la blua akvo tuŝata de la venteto kaj super la verdiĝanta lando brilis la suno.

Je la deka horo la boato ekveturis kaj per ses paroj da remiloj ĝi iris alborde. Kaj ili ree havis unu la alian. Kiam ili matenmanĝis en la granda manĝoĉambro, la aliaj gastoj flustris inter si: Ĉu ŝi estas lia edzino? Li parolis duonvoĉe kvazaŭ amanto kaj ŝi mallevis la okulojn ride-tante aŭ batetis liajn fingrojn per la buŝtuko.

La boato restis ĉe la ponto kaj ŝi estis direktonta la direktilon. Li prizorgis la malgrandan velon. Sed li ne povis forigi sian rigardon de ŝia bela, somervestita staturo, kun la alta, firma brusto, la decidema mieneto kaj

la forta rigardo supren al la vento, dum la mano vestita per cerva ganto tenadis la ŝnuron. Li volis nur babili kaj estis kelkfoje mallerta je la turnoj. Tiam li ricevis mallaŭdon kvazaŭ maristeto, kaj tio amuzis lin senlime.

—Kial vi ne kunprenis la etulinon? li diris por incite-
ti ŝin.

—Kiel vi opinias, kien mi estus ŝin kuŝiginta?

—En la militŝipon kompreneble!

Tiam ŝi ridetis, kaj tre plaĉis al li vidi ŝin rideti tiama-
niere!

—Nu, kion diris la mastrino hodiaŭ matene? li daŭr-
igis.

—Kion ŝi diru?

—Ĉu ŝi opiniis, ke ŝi dormis trankvile pasintnokte?

—Kial ŝi ne estus tion farinta?

—Ho, ne mi scias, sed povus esti, ke musoj skrapis la planktabulojn aŭ ke malnova subtegmenta luko knaris; oni ne povas scii, kio povas maltrankviligi la dolĉan dor-
mon de maljuna fraŭlino.

—Se vi ne silentas, mi fiksos la ŝnuron kaj veturigos
vin en la maron!

Ili albordiĝis ĉe insuleto kaj el malgranda korbo ili prenis tagmanĝon; poste ili pafis per revolvero al celta-
bulo. Post tio ili elmetis kaptostangojn ŝajnigante hok-
fiŝi, sed la fiŝoj ne ekkaptis la hokojn kaj tiam ili ree ek-
veturis. Sur la golfeto, kie la molanasoj flugis, en marko-

lojn, kie la ezokoj saltis, en la junkejon kaj ree eksteren, kaj li neniam laciĝis rigardi ŝin, babili kun ŝi, kisi ŝin, kiam li havis okazon.

Tiamaniere ili renkontiĝis sur Dalarö dum ses some-roj, ĉiam same junaj, ĉiam same petolplenaj, kaj ili estis feliĉaj. Dumvintre ili sidis en siaj malgrandaj kajutoj sur Skeppsholmen. Tiam li ŝnurarmis ŝipetojn al la knaboj aŭ amuzis ilin per aventuroj el Ĉinujo aŭ la sudmaraj insuloj, kaj la edzino sidis aŭskultante kaj ne povis ne ridi pri liaj gajegaj historioj. La ĉambro estis tre ĉarma, ĝi ne similis al iu alia. Tie pendis japanaj arkoj kaj lan-coj; negrotamburoj kaj sekigitaj flugfiŝoj, sukerkanoj kaj opiopipoj. Kaj paĉjo, kiu iom kalviĝis, neniam havis ple-zuron forestante. Kelkfoje li ludis triktrakon kun la militjuĝisto kaj kelkfoje ili ludis "vira"* prenante mode-ran grogon. La edzino antaŭe kunludis, sed de kiam ili havis kvar infanojn, ŝi ne havis tempon, sed ŝi volonte dum tempeto rigardis la ludkartojn kaj kiam ŝi venis al la seĝo de paĉjo, li ĉirkaŭprenis ŝian talion demandan-te ŝin, kion ŝi konsilas al li pri liaj kartoj.

La korveto estis vojaĝonta kaj restos for dum ses monatoj. La kapitano sentis sin malĝoja, ĉar la infanoj nun estis kreskintaj kaj por panjo estis iom malfacile prizorgi la grandan departementon. Kaj la kapitano ne plu estis tiel juna kaj tute tiel vigla kiel antaŭe, sed —

* *sveda kartludo*

devis esti, kaj li veturis. Apud Kronberg li jam sendis la unuan leteron, kiu havis jenan tekston:

”Mia amata suproŝnureto! La vento malforta S. O. S. ĝis O., +10° C. je la 6-a duonhoro de la libergardo. Mi ne povas priskribi, kiel mi sentas min for de vi dum tiu ĉi vojaĝo. Kiam mi levis la ankron antaŭ Kastellholmen (je la sesa kaj duono posttagmeze dum forta N. O. ĝis N.) estis kvazaŭ oni ĵetis ferpecon en mian bruston kaj mi sentis precize kvazaŭ oni enŝovus ĉenegon tra miaj oreloj. Oni diras, ke maristoj havas antaŭsentojn pri malfeliĉo. Pri tio mi nenion scias, sed antaŭ ol mi ricevos vian unuan letereton mi estas tre maltrankvila! Nenio okazis surŝipe, pro la simpla kaŭzo, ke nenio devas okazi. Kiel vi fartas hejme? Ĉu Bo jam ricevis siajn novajn botojn? Kiel ili konvenas? Mi estas malbona leterskribanto, kiel vi scias, kaj mi finas nun! Kun granda kiso precize sur tiu ĉi kruco X!

Via maljuna Pall.

P. S. Vi devas havigi al vi kunestanton, etulino, (virinan kompreneble!). Kaj ne forgesu peti la fraŭlinon en Dalarö, ke ŝi pretigu la militboategon ĝis mi hejmenvenos! (La vento plifortiĝas; ni havos ĝin de la nordo dumnokte!)”

Apud Porthmouth la kapitano ricevis la jenan leteron de sia edzino:

"Kara maljuna Pall!

Tie ĉi estas malagrable sen vi, kredu! Kaj malfacile estis, ĉar Alico nun ekhavis sian denton. La doktoro diris, ke estas neordinare frue, kaj oni diras, ke tio signifas (nu, tion vi ne sciuj!). La botoj de Bo bone konvenas kaj li estas tre fiera pro ili. — Vi menciis en via letero, ke mi devus havigi al mi kunestantinon. Tion mi jam faris, aŭ pli ĝuste, ŝi venis al mi. Ŝia nomo estas Otilio Sandegren kaj ŝi studis en seminario. Ŝi estas tre serioza, tial Pall ne havas kaŭzon timi, ke ŝi kondukos lian suproŝnureton sur kurbajn vojojn. Cetere ŝi estas religiema. Nu, certe ne domaĝus al ni ĉiuj, se ni estus iom pli severe religiemaj. Unuvorte ŝi estas eminenta virino. Kaj nun mi finas ĉifoje, ĉar Otilio venas por akompani min. Ŝi estas ĵus alveninta kaj petas sian nekonatan saluton!

Tute via Gurlio."

La kapitano ne estis kontenta pri tiu letero! Ĝi estis tro mallonga kaj ĝi ne estis tiel gaja kiel ordinare. Seminario, religiema, severa kaj Otilio; dufoje Otilio! Kaj poste Gurlio! Kial ne Gullan kiel antaŭe? Hm! Post ok tagoj apud Bordeaux li ricevis novan leteron kune kun libro sub banderolo. "Kara Vilhelmo!" — Hm, Vilhelmo! Ne plu Pall! — "La vivo estas lukto de ..." Pro la diablo, kio nun? Kiel koncernas nin la vivo! "... komenco ĝis fino! Trankvile kiel rivereto en Kidron ..." Kidron! Tio ja estas el

la biblio! — *”nia vivo pasas. Ni iris kvazaŭ somnambuloj trans abismoj ne vidante ilin!”* — Seminario, seminario! — *”Sed venas la etiko”* — Etiko! Ablativus! Hm, hm! — *”kaj ekregas je sia plej granda potenco!”* — Potenco?! — *”Kiam mi nun vekiĝas el mia longdaŭra dormo kaj demandas min mem: ĉu nia geedzeco estas vera geedzeco? mi devas pente kaj honte konfesi, ke ĝi ne estis tia! La amo estas de ĉiela deveno (Matt. XI:22).”* La kapitano devis levi sin kaj preni glason da rumo antaŭ la daŭrigo. — *”Kiel surtera, kiel konkreta estis la nia. Ĉu niaj animoj vivadis en la harmonio, pri kiu parolas Plato (Phaidon, libro VI, ĉap. II 9)? Ne! ni devas respondi. Kio mi estis por vi? Via hejmomastrino — kaj ho, honto! — via amatino! Ĉu niaj animoj komprenis unu la alian? Ne! ni devas respondi.”* — Pro milionoj da diabloj kaj Otilioj kaj ĉiuj satanaj seminarioj! Ĉu ŝi estis mia hejmomastrino? Ŝi estis mia edzino kaj la patrino de miaj infanoj! — *”Legu tiun ĉi libron, kiun mi sendas al vi! Ĝi donos al vi respondon al ĉiuj demandoj. Ĝi eldiras tion, kio kaŝiĝis funde en la koroj de la tuta virinaro dum jarcentoj! Legu ĝin kaj poste diru al mi, ĉu nia geedzeco estis vera geedzeco!”*

Petas surgenue tute via Gurli.”

Jen lia antaŭsento pri malfeliĉo! La kapitano estis duonfreneza pro kolero kaj ne povis kompreni tion, kio okazis al lia edzino! Tio ĉi estas pli malbona ol pietismo!

Li disŝiris la banderolon kaj legis sur la kovrilo de broŝurita libro: "Puphejmo de Henrik Ibsen." Puphejmo! Jes! Kio plu! Lia hejmo estis kvazaŭ delikata pupdometo kaj lia edzineteto estis lia pupeto kaj li estis ŝia pupego. Ili dumlude antaŭenmarŝadis sur la akra, makadama vojo de la vivo, kaj ili estis feliĉaj! Kio do mankas al ili? Kia maljustaĵo estas farita? Li devas kontroli, ĉar tio estas priskribita en tiu libro. —

Post tri horoj li finlegis ĝin! Sed li tute ne kapablis kompreni. Kiamaniere tio ĉi koncernas lin kaj lian edzinon? Ĉu ili falsis kambiojn? Ne! Ĉu ili ne amis unu la alian? Jes! — Li enŝlosis sin en la kajuto kaj relegis la libron; li substrekis per blua kaj ruĝa krajonoj kaj kiam komencis mateniĝi, li eksidis por skribi al sia edzino. Li skribis:

"Jen bonintenca eta Ablativus pri la dramo Puphejmo skribaĉita de la maljuna Pall enŝipe de Vanadiso sur la Atlantika Oceano apud Bordeaux (lat. 45°, long. 16°).

§1. Ŝi faris lin sia edzo, ĉar li amis ŝin, kaj prave ŝi agis, ĉar se ŝi estus atendinta ĝis venos tiu, kiun ŝi amas, eble okazus, ke li ne amas ŝin kaj tiam ŝi spertiĝus malagrabla ĉar, ke ili ambaŭ amegas unu la alian, okazas treege malofte.

§2. Ŝi skribas falsan kambion. Estas malsaĝa ago, sed ŝi ne diru, ke ŝi faris tion nur por la edzo, ĉar ŝi ja neniam

amis lin; se ŝi estus dirinta, ke estis por ili ambaŭ aŭ por la infano, ŝi estus dirinta la veron. Ĉu komprenite?

§3. Ke li ŝatas ŝin post la balo, tio nur montras, ke li amas ŝin, kaj tio ne estas malbona eco de li; sed ke oni montras tian aferon en la teatro, tio estas eraro. Il y a des choses qui se font mais qui ne se disent point (ekzistas aferoj kiuj estas farataj sed ne priparolataj) franco diris, se mi ne erarmemoras. Cetere la verkisto, se justa, estus prezentinta kontraŭan okazaĵon: la petite chienne veut, mais le grand chien ne veut pas (la hundineto volas sed la granda hundo ne volas) diras Ollendorff. (Komparu kun la militboatego en Dalarö!)

§4. Ke ŝi, eltrovante la aĉecon de la edzo, ĉar aĉa li estas volante ŝin pardoni pro tio, ke ŝia trompaĵo ne fariĝis eltrovita, volas foriri de siaj infanoj ne estante inda ilin eduki, tio estas malsagaca koketeco. Se ŝi estas stulta bovino (ĉar oni do ne lernas en seminario, ke estas permesite falsi kambiojn, ĉu?) kaj li estas bruto, ili nun devus bone kuniri jungite. Malplej vole ŝi lasus la edukon de siaj infanoj al tia fripono, kiun ŝi malestimas.

§5. Nora do havas eĉ pli grandan kaŭzon resti ĉe la infanoj vidinte la aĉecon de la edzo.

§6. Ke la edzo antaŭe ne ŝatis ŝin laŭ reala valoro ne estis lia kulpo, ĉar sian realan valoron ŝi ja ekhavis nur post la katastrofo.

§7. *Nora antaŭe estis stultulino, tion ŝi mem ne mal-konfesas.*

§8. *Ĉia garantio por ke ili post tio vivos inter si harmonie ja troviĝas: li pentis kaj volas pliboniĝi; ŝi ankaŭ! Bone! Jen la mano, kaj ni rekomencos denove! Egalaj infanoj ludas bone! Vi estis stulta bovino kaj mi kondukis kiel bruto! Vi, Norinjo, estis malbone edukita, mi, maljuna aĉulo, ne lernis pli bone. Kompatu nin ambaŭ! Ĵetu malfreŝajn ovojn al niaj edukintoj sed ne batu nur min. Kvankam viro, mi estas same senkulpa kiel vi! Eble iom pli senkulpa, ĉar mi edziĝis pro amo, vi pro ekonomio! Estu ni tial amikoj kaj instruu ni kune al niaj infanoj el la multekosta scio, kiun donis al ni la vivo!*

Ĉu kompreneble? All right!

Tion la kapitano Pall skribis per siaj rigidaj fingroj kaj malvigla intelekto!

Kaj nun, mia amata pupeto, nun mi legis vian libron kaj diris mian opinion, sed kiel ĝi koncernas nin? Ĉu ni ne amis unu la alian? Ĉu ni ne daŭre amas unu la alian? Ĉu ni ne edukis nin ambaŭ kaj forrabortis la akraĵojn, ĉar vi certe memoras, ke troviĝis iom da akraĵoj kaj malglataĵoj komence! Kia kaprico do estas tio ĉi! Al la infero iru Otilioj kaj seminarioj! Estas malfacile komprenebla libro, kiun vi donis al mi. Ĝi estas kvazaŭ sur la karto malbone montrita marvojo, kie oni povus surfundiĝi kiam ajn. Sed mi prenis la ilaron kaj perpunkte desegnis la vojon sur la

karton, tiel ke mi venis en trankvilan akvon. Sed certe mi ne refaros tion. Rompu la diablo tiajn nuksojn, kiuj fine rompitaĵas estas nigraj interne. Kaj nun mi deziras al vi pacon kaj feliĉon kaj vian saĝon returne. Kiel fartas miaj etuloj? Vi forgesis lastfoje skribi pri ili! Tion eble okazigis la multa zorgo pri la malbenindaj idoj de tiu Nora (kiuj ekzistas nur en la dramlibro). Ĉu ploras mia filo, ĉu ludas mia tilio, ĉu kantas mia najtingalo kaj ĉu dancas mia pupeto? Tion ŝi ĉiam faru, ĉar tiam la maljuna Pall ĝojiĝas. Kaj nun Dio vin benu kaj ne permesu al iaj malbonaj pensoj veni inter ni. Mi estas tiom malĝoja, ke mi ne povas diri kiom. Kaj mi devas sidi tie ĉi skribante recenz-artikolojn pri dramo! Dio gardu vin kaj la etulojn, kisu ĝuste iliajn buŝojn de via maljuna Pall.”

Sendinte la leteron la kapitano malsupreniris en la ŝiprestoracion kaj havigis al si grogon. Li havis la kuraciston kun si. — Hu, li diris, ĉu vi sentis, kiel odoras malnovaj nigraj pantalonoj? Hu! Fi! La diablo min prenu, se oni ne devus ilin suprentiri en maston kaj trablovigi ilin per fortega N. Okc. ĝis N. — Sed la kuracisto nenion komprenis! — Otilio, Otilio en inferon! Ŝi devus havi porcion da bastonado! Malsuprensendu la diablon en loĝejon de maristo ... Li certe scias, kion bezonas maljuna senedza virino! — Sed kio do estas, maljuna Pall? demandis la kuracisto. — Plato! Plato! La diablo

prenu Platon! Jes, kiam oni restas surmare dum ses monatoj, tiam estas Plato! Tiam oni fariĝas etika! Etika! Hu! Mi vetas hokon kontraŭ hoktruo ke, se Otilio ricevus kion ŝi bezonas, la diablo min prenu, se ŝi parolus pri Plato! — Sed kio do estas? — Ho, estas nenio. Aŭskultu! Vi, kiu estas kuracisto! Kiaj estas la virinoj, — vi efektive? Kiel? Ĉu ne estas danĝere vivi longtempe sen edzo? Ĉu ili ne fariĝis iom ... strangaj? Ĉu? — La kuracisto diris sian opinion finante per bedaŭro, ke ne ĉiuj inoj havas okazon gravediĝi. En la naturo, kie la virseksulo plej ofte vivas poligamie, kion li en plej multaj okazoj povas fari, ĉar nutraĵo por la idoj troviĝas (escepte por la rabobestoj) tie ne ekzistas tiaj malnormalaĵoj kiaj fraŭlaj inoj. Sed en la kulturo, kie sufiĉa pano estas bonŝanco, tio estas ordinara, precipe ĉar la virinoj estas pli multnombraj ol la viroj. Tial oni devas esti bona al fraŭlaj virinoj, ĉar ilia sorto estas bedaŭrinda!

—Jes, oni devas esti bona! Estas facile diri tion, sed ili ne volas esti bonaj! — Kaj nun ĉio fluas el lia buŝo, eĉ ke li skribis recenzon de dramo. — Ho, ili skribas tiom da sensencaĵo, la kuracisto diris metante la kovrilon sur la grogokruĉon. La scienco fine decidas pri la gravaj demandoj! La scienco!

Kiam la kapitano post sesmonata forestado kaj malgajiga korespondado kun sia edzino, kiu akre kritikis lian dramrecenzon, fine elŝipiĝis ĉe Dalarö, lin akceptis

lia edzino, ĉiuj infanoj, du servistinoj kaj Otilio. La edzino estis milda, sed ne kora. Ŝi donis sian frunton por kiso. Otilio estis alta kiel masto kaj havis detranĉitan hararon, tiel ke ŝia nuko aspektis kvazaŭ broso. La vespermanĝo estis teda kun teo. La militboatego estis plenigita per infanoj kaj la kapitano ricevis mansardon. Ho, kiel diference al antaŭe! Maljuna Pall aspektis maljuna, kaj konsternita li ankaŭ estis. Estas vera infero, li opiniis, esti edzo, sed ne havi edzinon!

La sekvantan matenon li deziris la akompanon de sia edzino por ŝipveturo. Sed Otilio ne toleris marveturon. Ŝi estis tiel malsana dum la alveturo. Kaj cetere estas dimanĉo. Dimanĉo? Ah, jen! Sed ili anstataŭe promenis. Certe al ili restas multe por preparoli. Ho, jes, kiom restas al ili por preparoli. Sed Otilio ne kunestu!

Ili ekpromenis kun la brakoj ĉirkaŭplektitaj. Sed ili ne parolis multe; kaj tio, kion ili diris, pli ĝuste estis vortoj por kaŝi la pensojn ol pensoj esprimataj per vortoj.

Ili preterpasis la malgrandan ĥolertombejon kaj ekiris sur la vojon malsupren al la Svisvalo. Venteto siblis inter la piceoj kaj tra la malhela vegetaĵo la golfeto brilis bluega. Ŝi eksidis sur ŝtonon. Li apud ŝiajn piedojn. Nun baldaŭ eksplodos, li pensis. Kaj eksplodis!

—Ĉu vi pensis iom pri nia geedzeco? ŝi komencis.

—Ne, li diris, kvazaŭ li jam elpensis sian parolon; mi nur sentis ĝin! Mi nome kredas, ke la amo estas sento-

afero; oni veturas laŭsente kaj atingas havenon, sed irante laŭ kompasoj kaj karto oni surfundiĝas.

—Jes, sed nia geedzeco estis nur Puphejmo!

—Malvero, se vi permesas. Vi neniam falsis kambion, vi neniam montris viajn ŝtrumpojn al ia sifilisa doktoro, de kiu vi volis prunti monon kontraŭ garantio per naturaĵoj; vi neniam estis sufiĉe romantike stulta por atendi, ke via edzo denuncos sin pri krimo, kiun faris lia edzino pro stulteco, kaj kiu ne fariĝis krimo, ĉar ne troviĝis akuzanto; vi neniam mensogis al mi! Mi traktis vin same honeste kiel Helmer traktis sian edzinon, kiam li faris ŝin intima kun sia animo, permesis al ŝi diskuti la aferojn de la banko, enmiksiĝi en la dungon por oficoj ktp.! Ni do estis edzo kaj edzino laŭ ĉiaj opinioj, kaj malmodernaj kaj novmodaj!

—Jes, sed mi estis via hejmomastrino!

—Malvero, se permesate; vi ne manĝis en la kuirejo, vi ne prenis salajron, vi neniam devis detale raporti pri mono, neniam ricevis insultojn, se tio kaj alio ne estis en ordo! Kaj ĉu vi opinias, ke mia laboro, tiri kaj brasi kaj kribi: pafite saluto, kalkuli haringojn kaj mezuri brandon en glasojn, pesi pizojn kaj provi farunon, ĉu vi opinias, ke tio estas pli honora ol kontroli servistinojn: viziti la bazon, naski infanojn kaj eduki ilin!

—Ne, sed vi ricevas pagon pro tio; vi decidis pri vi mem, vi estas viro kaj vi regas!

—Mia amikineto! Ĉu vi deziras salajron de mi? Ĉu vi volas fariĝi mia efektiva dommastrino? Ke mi estas viro, tio estas hazardo, ĉar tio ja decidiĝas nur en la sesa monato. Tio estas bedaŭrinda, ĉar esti viro nuntempe estas krimo, sed kulpo ĝi ne estas. Kaj la diablo prenu tiun, kiu kolerigis la du duonojn de la homaro unu kontraŭ la alia! Tiu havas grandan respondecon.

Ĉu mi regas? Ĉu ne regas ni ambaŭ? Ĉu mi faras ion gravan sen konsiliĝo kun vi? Ĉu? Sed vi, vi edukas viajn infanojn laŭ via kapo! Ĉu vi memoras, kiam mi volis forigi la luladon, kiun mi konsideris kiel krima, ĉar ĝi ebrigas la infanojn ĝis dormo. Tiam al vi estis permesate regi. Alian fojon mi regis; venontan fojon vi regis! La mezo ne ekzistis, ĉar inter luli kaj ne luli ekzistis nenio! Ĉio tamen estis bona ĝis nun! Vi forlasis min por Otilio!

—Otilio! Ĉiam Otilio! Ĉu ne vi mem sendis ŝin al mi?

—Ne precize ŝin! Sed nun ŝi regas!

—De ĉio, kion mi ŝatas, vi disigas min!

—Ĉu Otilio estas ĉio? Ŝajnas tiel!

—Sed mi ne povas ŝin forsendi nun, kiam mi dungis ŝin por instrui pedagogion kaj la latinan lingvon al la knabinoj!

—La latinan! Ablativus! Sinjoro Jesuo, ĉu ankaŭ ili estos difektataj?

—Nu, ili devas scii same multe kiel scias viro, kiam ili edziniĝos, por ke estu vera geedzeco!

—Sed kara animo, ne ĉiuj edzoj konas la latinan! Mi ja konas nur unu vorton latinan kaj ĝi estas Ablativus! Kaj ni tamen estas feliĉaj! Cetere oni ja estas foriganta de la viroj la latinan kiel senutilan. Ĉu ankaŭ vi nun trapasos la saman benindaĵon! Ĉu vi ne scias lerni de la ekzemplo! Ĉu ne sufiĉas difekti la viraron; ĉu oni nun difektos ankaŭ la virinaron! Otilio, Otilio, kial vi faris al mi tion!

—Mi ne volas plu diskuti tiun aferon! Sed nia amo, Vilhelmo, ne estis tia, kia ĝi devas esti. Ĝi estis volupta!

—Kara mia, kiel ni povus havi infanojn, se nia amo ne estus volupta — ankaŭ! Sed ĝi ne estis nur volupta!

—Ĉu io povas esti nigra kaj blanka samtempe? Tion mi volas demandi! Respondu al tio!

—Jes, tio povas okazi: via sunombrelo estas nigra eksterflanke sed blanka internflanke!

—Sofisto!

—Aŭskultu, mia amata amikino, parolu per via propra lango kaj per via propra koro, kaj ne per la libroj de Otilio! Kaptu vian prudenton kaj estu vi mem, mia propra amata edzineto!

—*Via, via propra, propraĵo*, kiun vi aĉetas por tio, kion vi gajnas per *via* laboro!

—Kiel, observu la vorton, *mi, via* edzo, *via propra* edzo, al kiu neniuj aliaj virinoj rajtas rigardi, se ŝi volas konservi siajn okulojn en la kapo, kaj kiun vi *ricevis*

donace, ne kiel kompensaĵo por tio, ke li ricevis vin! Ĉu tio ne estas "partie egale"!

—Sed ĉu ni ne forludis nian vivon? Ĉu ni havis iajn altajn interesojn, Vilhelmo!

—Jes, ni havis la plej altajn interesojn, Gurli; ne ĉiam ni ludis, ĉar ni ankaŭ havis seriozajn momentojn! Ni havis la plej altajn interesojn, kiujn oni povas havi; ĉar ni donis vivon al la estonta generacio, ni penadis tre brave, kaj vi ne malpleje, por la etuloj, kiuj fariĝos grandaj. Ĉu vi ne por ili kvarfoje estis proksima al la morto? Ĉu vi ne cedis la noktan dormon por ilin luli, la amuzojn de la tago por ilin prizorgi; ĉu ni ne povus havi ses ĉambrojn kaj kuirejon ĉe la Reĝina strato kaj serviston, anstataŭ loĝi en La Longa vico, se ni ne havus la etulojn; ĉu Gullan ne povus havi silkon kaj perlojn kaj ĉu la maljuna Pall ne povus iri sen saketoj je siaj pantalongenuoj, se ni ne havus la etulojn! Ĉu ni estas tiaj pupoj? Ĉu ni do estas tiel egoistaj kiel asertas maljunaj fraŭlinoj, kiuj plejofte malakceptis virojn, ĉar tiuj ne estis indaj al ili! Informiĝu vi pri la kaŭzoj, kial tiom da virinoj estas senedzaj! Ili ĉiuj certe scias fanfaroni, ke ili havis proponojn, sed tamen ŝatas esti martiroj! Altaj intereso! Studi la latinan! Vesti sin duonnuda por bonfara celo kaj lasi la infanojn malbonfartante kuŝi en malsekaj vindotukoj! Mi kredas, ke mi havas pli altajn interesojn ol Otilio, kiam mi volas havi fortajn, gajajn infanojn, kiuj iam povos fari en la

vivo tion, por kio al mi mankis tempo! Sed ne taŭgas latinlingvo! Adiaŭ, Gurli! Nun mi devas iri al la deĵoro. Ĉu vi kuniros?

Ŝi restis sidanta kaj ne respondis. — Li iris per pezaj, ho kiel pezaj paŝoj. Kaj la blua golfeto fariĝis malhela kaj la suno ne plu brilis por li. Pall, Pall, kien tio kondukos, li ĝemete diris al si mem, transgrimpante la barilon apud la tombejo; mi deziras, ke mi kuŝus tie sub lignopeco, tie malsupre inter arboradikoj; sed certe mi ne povus akiri trankvilon, se mi kuŝus tie sola! Gurli! Gurli!

*

—Nun estas tute freneze, bopatrino, la kapitano diris unu tagon en la aŭtuno, kiam li venis al la maljunulino ĉe Sture-strato.

—Kio nun estas, kara Ville?

—Ili estis ĉe ni hieraŭ. Antaŭhieraŭ ili estis ĉe la princino. Kaj tiam la malgranda Alice ekmalsaniĝis. Estis malbonŝanco kompreneble, kaj mi ne kuraĝas sendi por hejmenigi Gurlin, ĉar ŝi nur estus pensanta, ke estas preparite. Ho! Kiam la konfido iam estas movita, tiam ... Mi estis ĉe la militkomisario la alian tagon kaj demandis, ĉu laŭ sveda leĝo oni rajtas per fumado mortigi la amikinojn de sia edzino! Ne, oni ne rajtas. Kaj se oni rajtus, oni ne kuraĝus, ĉar tiaokaze ĉio estus finita. Pro

la diablo, multe pli bone, se estus amanto; ĝin oni povus kapti je la kolo kaj piedbata eligi. Kion mi faru?

—Nu jes, estas malfacila demando, kara Ville, sed ni devas elpensi ion. Granda viro kia vi ne devas estadi sen edzino tiamaniere!

—Ne, tion mi ja diras! Mi diris al ŝi serioze la alian tagon ke, se ŝi ne estas bona, ŝia edzo baldaŭ iros al aliaj virinoj!

—Nu, kion ŝi tiam diris?

—Ŝi diris: tion li rajtas, ĉar sian korpon ĉiu posedas.

—Ŝi do ankaŭ, kompreneble?

—Jen agrablaj teorioj! Tio donos al mi grizajn harojn, bopatrino!

—Fari ŝin ĵaluza estas malnova bona rimedo. Tio ĝenerale estas efika kuracilo, ĉar tiam la amo aperas, se ĝi ankoraŭ restas!

—Ĝi restas!

—Certe! Ĉar la amo ne mortas subite; ĝi povas esti gratata dum jaroj, se eĉ tio estas ebla!

—Amindumu Otilion kaj poste ni vidu!

—Amindumi! Ŝin!

—Provu! Ĉu ne ekzistas io, kion vi scias, kaj kio interesas ŝin?

—Nu, lasu min pensi! Ili nun okupas sin pri statistiko! Falintaj virinoj, infektaj malsanoj, hu! Se oni kondukus tion al la matematiko! Ĝin mi almenaŭ scias!

—Nu, jen! Komencu per la matematiko, transiru al ŝalsurmetado kaj butonumado de ŝiaj surŝuoj. Akompanu ŝin hejmen en la vesperoj! Trinku ci-toston* kun ŝi kaj kisu ŝin dum Gurli rigardas. Se necese, estu trudema. Ho, ŝi ne koleriĝos, vi kredu. Kaj poste multe da matematiko, tiel multe, ke Gurli devas sidi aŭskultante kaj silente. Revenu do post unu semajno kaj rakontu al mi!

La kapitano hejmeniris kaj tralegis la lastajn broŝurojn pri malmoraleco kaj post tio li komencis realigi sian planon.

Post unu semajno li ĝoja kaj kontenta sidis ĉe sia bo-patrino trinkante glason da bona vino. Li estis vere ĝoja.

—Rakontu, rakontu, la maljunulino diris suprenŝovante siajn okulvitrojn.

—Nu, aŭskultu: estis malfacile la unuan tagon, ĉar ŝi suspektis min. Ŝi pensis, ke mi moketas ŝin, sed mi parolis pri la grandega influo al la moralstatistiko, kiun la probablectorio havis en Ameriko. Tio tute simple faris sukceson. Ĉu tiel, tion ŝi ne sciis, kaj tio incitis ŝin. Mi donis ekzemplon kaj montris per ciferoj kaj literoj, ke oni povas kun certa probableco kalkuli, kiom da virinoj

* En Svedujo oni uzas la titolojn kiel alparolaj vortoj. Por ne devi ripetadi la titolojn oni ofte, post ioma konatiĝo kun persono proponas anstataŭe uzi "du" (ci) unu al la alia. Tion oni kelkfoje festas trinkante glason da vino aŭ alia trinkaĵo kaj kisante unu la alian.

falos. Tio mirigis ŝin. Nun mi vidis, ke ŝi estas scivola kaj deziris havigi al si la tuton por venonta kunveno. Gurli ĝojis vidi, ke ni amikiĝis, kaj ŝi eĉ instigis nin. Ŝi enŝovis nin en mian ĉambron kaj fermis la pordon; kaj tie ni sidis kalkulante la tutan posttagmezon. Ŝi estis feliĉa, la aĉulino, ĉar ŝi sentis, ke ŝi gajnis ion de mi, kaj post tri horoj ni estis geamikoj. Dum la vespermanĝo mia edzino opiniis, ke Otilio kaj mi konas unu la alian sufiĉe longe por ke ni diru "ci". Mi alportigis iom da mia malnova bona vino por festi la grandan okazon. Kaj mi kisis ŝin ĝuste sur la buŝon. Dio pardonu miajn pekojn. Gurli aspektis iom konsternita, sed ne koleriĝis. Ŝi estis treege feliĉa. La vino estis forta kaj Otilio estis malforta. Mi helpis ŝin surmeti la mantelon kaj akompanis ŝin hejmen. Premis ŝian brakon sur la Skeppsholma-ponto kaj klarigis al ŝi la tutan stelaron. Ho! Ŝi estis ravita!

Ĉiam ŝi amis la stelojn, sed neniam lernis, kiel ili nomiĝas. La kompatindaj virinoj neniam havas okazon ion lerni. Ŝi efektive revis kaj ni disiĝis kiel plej karaj geamikoj, kiuj miskomprenis unu la alian tiel longe, tiel longe. La postan tagon pli da matematiko. Ni okupis nin pri tio ĝis la vespermanĝo. Gurli envenis kelkajn fojojn kaj kapsalutis al ni. Sed dum la vespermanĝo estis preparolata nur matematiko kaj steloj, kaj Gurli ridis silente aŭskultante. Poste mi akompanis ŝin hejmen. Sed sur la kajo mi renkontis kapitanon Björn. Ni ensoviĝis en Grandan

Hotelon kaj ekhavis glason da punĉo. Venis hejmen je la unua.

Gurli ne estis enlitiĝinta. "Kie vi estis tiel longe, Vil helmo?" ŝi diris.

Tiam la diablo enflugis en mian animon kaj mi respondis: "Ni promenis parolante sur la Holma ponto tiel longe, ke mi tute forgesis kioma horo estas." Tio efikis.

"Ŝajnas al mi, ke ne estas tute konvene promeni nokte kun juna virino," ŝi diris.

Mi ŝajnis min embarasita balbutante, ke kiam oni havas tiel multe por preparoli, oni ne ĉiam scias, kio estas konvena.

"Pri kio vi do parolis," Gurli diris farante mieneton.

Tion mi ne povis memori.

—Tre bone, mia knabo, la maljunulino diris; plue, plue!

—La trian tagon, la kapitano daŭrigis, Gurli envenis kun manlaboro kaj restis ĝis la fino de la matematiko. La vespermanĝo ne estis tute tiel gaja, sed des pli astronomia. Mi helpis al la aĉulino surmeti la superŝuojn, kio forte impresis Gurlin, kiu turnis nur la vangon al Otilio por kiso, kiam ŝi estis ekironta. Mi brakpremis sur la Holma ponto parolante pri simpatio de la animoj, pri la steloj kiel la hejmo de la animoj. Trinkis punĉon en Granda Hotelo kaj hejmenvenis je la dua. Gurli ne estis enlitiĝinta; mi vidis tion, sed mi iris rekte en mian ĉam-

bron, fraŭlo nun, vi komprenas, kaj Gurli hontis postveni por demandi. La postan tagon astronomio; Gurli deklaris, ke ŝi havas grandan emon partopreni, sed Otilio diris, ke ni tro multe enprofundiĝis en la temon, kaj ke ŝi poste komunikos al ŝi la fundamentojn. Gurli estis incitita kaj eliris. Multe da vino por la vespermanĝo.

Kiam Otilio dankis pro la vespermanĝo, mi ĉirkaŭprenis ŝian talion kaj kisis ŝin. Gurli paliĝis. Dum mi butonumadis ŝiajn superŝuojn mi prenis per la mano iomete hm ...

—Ne embarasiĝu antaŭ mi, Ville, la maljunulino diris, mi estas maljuna, mi!

—... jene ĉirkaŭ ŝia kruro. Ne malbone, cetere! Hm! Vere ne malbone! Hm! Sed kiam mi intencis surmeti mian palton, jen, tie Lina staris preta hejmenakompani la fraŭlinon. Gurli prezentis ekskuzon por mi; mi malvarmumiĝis lastvespere, timis la noktan aeron. Otilio ŝajnis konfuzita kaj ne kisis Gurlin antaŭ ol ŝi iris. La sekvantan tagon mi estis montronta al Otilio astronomiajn instrumentojn en la lernejo je la dekdua. Ŝi ankaŭ venis, sed estis malĝoja. Ŝi ĵus estis vizitinta Gurlin, kiu traktis ŝin malamike. Ŝi ne povis kompreni la kaŭzon. Kiam mi hejmenvenis por tagmanĝi, Gurli estis tute ŝanĝita. Ŝi estis malvarma kaj muta kiel fiŝo. Ŝi suferis. Mi vidis tion. Sed nun tranĉilo estu uzota.

”Kion vi diris al Otilio, ĉar ŝi estis tiel malĝoja?” mi komencis.

”Kion ŝi diris? Nu, ŝi diris al ŝi, ke ŝi estas koketulino. Tion ŝi diris.”

”Kiel vi povas diri tion?” mi diris. ”Vi do ne estas ĵaluza, ĉu.”

”Mi ĵaluza pro tiu?” ŝi ekkriis.

”Jes,” mi miris, ”ĉar tia inteligenta kaj saĝa virino certe ne koketadas edzon de aliulino.”

”Ne, (nun ĝi venis) sed alies edzo povas amindumi alian virinon. Huhuhu!”

Nu, estis prete. Mi defendis Otilion ĝis Gurli nomis ŝin maljuna virinaĉo, kaj mi ankoraŭ defendis ŝin. Tiun posttagmezon Otilio ne venis. Ŝi skribis malvarmetan leteron ekskuzante sin, sed ŝi certe vidis, ke ŝi estas superflua. Mi protestis kaj volis iri por venigi ŝin. Sed tiam Gurli furioziĝis. Ŝi certe vidas, ke mi enamiĝis en tiun Otilion, ke ŝi (Gurli) por mi signifas nenion; ŝi scias, ke ŝi estas stultulino, ke ŝi nenion scias, por nenio taŭgas kaj ke, huhuhu, matematiko, tio estas al ŝi tute nebla. Mi venigis veturilon kaj ni veturis al la restoracio Lidingöbro. Tie ni trinkis varman vinon kaj manĝis grandegan supeon, ree estis kvazaŭ edziĝa festo, kaj ni veturis hejmen!

—Nu, poste? la maljunulino diris rigardante super la okulvitroj.

—Poste! Hm! Dio pardonu miajn pekojn! Sed mi delogis ŝin! La diablo min prenu, se mi ne delogis ŝin en mia propra fraŭlolito! Kion vi diras pri tio, grandpatri-
no?

—Ĝuste vi faris! Kaj poste?

—Ho, poste! Poste ĉio estis "all right" kaj nun ni diskutas infanedukon kaj la liberiĝon de virinoj el malnova superstiĉa kaj fraŭlina kapriceco kaj romantikeco kaj la diablo kaj lia Ablativus, sed nun ni parolas duope, tiel oni plej bone komprenas unu la alian! Ĉu ne vere, maljunulino?

—Jes, mia kara, kaj nun mi ree iros por rigardi vin.

—Faru tion, vi! Tiam vi vidos, kiel la pupoj dancas kaj alaŭdoj kaj kornikoj kantas kaj pepas, kaj vi vidos, ke tie regas ĝojo, ĉar tie neniu atendas monstrojn, kiuj ekzistas nur en fabelolibroj! Tie vi vidos veran puphejmon!

August Strindberg

Fragmento el la romano "Giftas"

El la sveda tradukis Anna Gyllsdorf

Ĉu ekzistas anĝeloj?

Ĉi tio, kara leganto, estas serioza rakonto

Ni prezentas nin

La ĉefoficejo de AS Haringobanko havas lokon en majesta kvinetaĝa domo, kiu plenigas la kvartalon de strato al strato. La grundo estas grandega kaj la kvadratmetroj inter la plej kostaj en la urbo. Tiu ĉi palaco estas notita en la balancfolio je la valoro de unu krono.

Neniu devus timi pagi la duoblon.

La fenestrovitroj brilas klare poluritaj. La fasado estas el hakitaj ŝtonoj, kiuj nigriĝis pro vetero, vento kaj aĝo. Ĝi havas la formon de larĝbaza rektangulo kaj aspektas, precipe post pluvo, kiel kolerema pugno.

Sed la banko aplikas absolutan politikon de amikeco en sia reklamo.

Estas cetere malfacile konstrui domon, kiu aspektus kiel granda sino.

Kiam la okcidenta vento ĵetas sin de la maro sur la teron, la larĝa fasado de la banko devas akcepti unu el la unuaj frapoj. La ŝtormo ĵetadas sin senkompate kontraŭ la glate poluritajn fenestrojn kaj batas per saloriĉa akvo sur ilin. Fukodoro enŝteliĝas internen tra la granda enirejo kun la klientoj. Kaj ne eliras.

La banko situas bone kaj por la haringoj kaj por la fiŝistoj. Kaj la ŝipposedantoj.

La banko situas apud la havenkanalo. Sur la strato inter la banko kaj la kanalo veturas tramoj. Unu post la alia ili alvenadas kaj kaŭzas bruon maltrankvilon sur la strato. Per strangaj tertremaj skuoj tiu maltrankvilo disvastiĝas de la keloj ĝis la subtegmentejoj en la apudaj domoj.

Eĉ la fieraj bankpalacoj skuiĝas.

La havenkanalo kondukas al haveno, kiu malfermiĝas al la maro. De la fenestroj de la banko oni vidas tutan arbaron da mastoj kaj fumtuboj. Skuiĝanta arbaro, kiam la vento blovas.

La enirpordoj de la banko estas palacoj dignaj. Ili estas pezaj, kaj du homoj estas bezonataj por malfermi kaj fermi ilin. Simbolaj reliefaj figuroj kovras la pordojn. Ili reprezentas virtojn, kiaj estas ŝparemo, laboremo, industriemo kaj honesto. Inter ili superregas honesto. Ĉiuj, kiuj eniras ĉi tien, devas vidi ĝin.

Se oni klopodas eniri aliloke, oni aktivigas efikan ŝtelalarmon. Plej taŭgas esti honesta.

Bernt Hagson estas pedelo en AS Haringobanko.

Li estas iniciatema kaj laborema. Ĉiun tagon inter la oka kaj duono kaj la kvara li iras kun la manoj surdorse tien kaj reen en la banka enirejo kaj rigardas la pasantojn. Ofice li portas malhelan jaketon kun orumitaj butonoj kaj nigran kravaton. Ĉirkaŭ la dekstra brako li havas bendon, sur kiu estas skribite INFORMOJ.

Li estas cent okdek alta, ĉirkaŭ tridek jarojn aĝa, havas helan hararon kombitan malantaŭen kaj okulharojn, kiuj estas kelkfoje tufaj. La okuloj estas bluaj kaj senesprimaj.

Multaj afablaj homoj kun pokerludo kiel profesio perdis grandajn sumojn je la senesprima rigardo de Hagson. Hagson estas rapidpensa, havas bonan memoron kaj povas esti kiom ajn impertinenta, se bezonate.

Li konas la plej multajn preterpasantojn. Kurknabojn li ne vidas, ili estas danĝera bando, kiun oni devas subpremi. Kurknabinoj estas malpli danĝeraj. Ilin li salutas per *Ĉaŭ ĉaŭ bebulino!* Bebulinojn, kiuj proksimiĝas al dudek, li alparolas per *Bonan tagon, belulino!* kaj tute laŭ la cirkonstancoj li okulumas, profunde riverencas aŭ rigardas impertinente.

Banksenditojn ambaŭseksajn, kiuj jam pasis la kritikajn jarojn, li salutas per levo de la dekstra montrofinbro en la aeron.

Kiam la pli altranga klientaro ne prezentiĝas per sendito, sed venas en formo de ŝipposedanto, direktoro aŭ simile, oni kompreneble ne povas elbuŝigi *Ĉaŭ ĉaŭ* aŭ fari framasonan signon per dekstra montrofinbro, sed riverencas bele kaj elegante. Ne tro malprofunde, ĉar tiam la potenculo povas ofendiĝi, sed ankaŭ ne tro profunde, ĉar malgraŭ ĉio oni reprezentas solidan entreprenon. Neniu servisteco, estas skribite en la oficregulato. Korekta ĝentileco.

Kiam Hagson pro sia laboro laciĝis en la kruroj aŭ kutoj, li eniras budeton flanke de la enirejo. Super ĝi ankaŭ estas skribite INFORMOJ. Sub ĝia benko Hagson konservas termoson, kiu vintre enhavas varman kafon kaj somere malvarman bieron. Sur la benko estas telefono kaj super ĝi pendas mistika folio.

dujuspikingliŝ - jes - ĝest e minit pliz 189
spreĥen zi doĵĉ - ja (Skanio) - moment bite 196
palevufransé - vi vi misjé - in minit misjé 401
abla ustéd espanjól - si - moménto 510
Larsson 161

La banko kompreneble havas eksterlandajn klientojn kaj tuj, kiam Hagson rimarkas iun, kiu aspektas ekster-

lande hezitema, li recitas sian parkeraĵon. Precipe kiam la haveno ricevas viziton de fremdaj turistŝipoj, la banko pleniĝas je homoj, kiuj volas ŝanĝi monbiletojn kaj ĉekojn, kaj Hagson, kiu opinias, ke estas amuze utiligi siajn lingvokonojn, neniam perdas la okazon.

Se neniu el la mondlingvoj taŭgas, li scias tamen elturni sin. Li prenas la koncernan klienton je la brako, diras "Sekvu min!" kaj tiras la klienton al la giĉeto por fremda valuto.

—Pssst! li diras, okupiĝu pri ĉi tiu, li parolas neniun lingvon.

Kio poste okazas, ne estas lia afero.

Maldekstre de la enirejo situas la prunteprena sekcio. Buntaj afiŝoj montrantaj gajajn kaj kontentajn homojn kaj instigantaj al gaja kaj kontenta ŝparado pendas sur la muroj. Ĉe ĉiu giĉeto staras brile glata hejmŝparujo. Neniu homo scias, ke la kasistoj, kiam ili ricevas tian agrablan ujeton en la manon, pensas: Diabla merdo!

Grandaj tabeloj sur la benko montras, kiel nekredeble mallonga tempo estas bezonata, por ke kapitalo duobliĝu je kvarpocenta rentumo. Nur dek ses jaroj.

Pasis duona homaĝo, de post kiam la prunteprena rentumo estis tiom alta.

Dekstre situas la kapitalsekcio. Pro pluraj kaŭzoj ĝi vekas malagrablon ĉe Hagson, kaj li preferas stari dorso al ĝi. Same kiel hela kaj gaja estas la ŝparkaso, same

tombe severa estas la kapitalsekcio. Tien ĉi eniras tiuj, kiujn ne allogas la vortoj pri celkonscia ŝparado je malalta rentumo, sed deziras havi altan dividendon je sia mono. Tien ĉi eniras ankaŭ la akciuloj, kiuj nek volas rentumon nek dividendon, sed profiton.

La kapitalsekcio estas trankvila fiŝakvo. Grandaj fiŝoj naĝas ĉi tie.

Duonŝtuparo kondukas al la bankhalo. La enirejo estas trankvila golfo kompare kun la ariĝanta hommaro de la bankhalo. Tajpiloj kraketas, kalkuliloj tusadas kiel fti-zuloj delonge malsanaj, la monernombriroj tintadas. La homoj laboras kiel idiotoj. La kaso situas rekte antaŭe, maldekstre la eksterlandaj sekcioj, dekstre la pruntedonado. Malantaŭ apartaĵo maldekstre, pli ol homalta, situas la interkompensa sekcio. Ĉi tie interne kvin aŭ ses kalkuliloj mueladas la tutan tagon.

Ili estas prizorgataj de junulinoj. Ili faras po pli ol dudek mil premojn ĉiun horon dum okhora labortago. Ne niu metus viron al tia laboro.

Viroj havas animon.

Ĉe la pruntedonado laboras du homoj, kiuj ĝenas la trankvilon de Hagson: fraŭlino Margareta Günter kaj sinjoro Adolf Westin. Fraŭlino Günter estas pinupino kaj ŝi siblis al Hagson tre akre, ĉar li kuraĝis nomi ŝin bebulo. Li faris tion nur unu fojon.

Li riverencetas. Ŝi resalutetas.

Westin estas alia individuo. Li turmentas la subulojn kaj komplezaĉas al la superuloj. Tuj, kiam skribaĵo devas esti traktota de la direkcio, li akiras ĝin kaj surmetas sian nomosignon.

Se li povus meti sian nomosignon sur la necesejan paperon de la direkcio, li farus tion.

Dekstre de la enirejo estas ŝtuparo. Ĝi kondukas al la supraj etaĝoj kaj estas sociologia studo.

DIREKCIO estas skribite per grandaj literoj komence de la ŝtuparo, kaj sago montras supren laŭ la ŝtuparo. La literoj kaj la sago estas ĉizitaj el tropika ligno. La ŝtuparo estas larĝa kiel rivero, la materialo plej luksa marmoro. La ŝtupoj estas malaltaj kaj larĝaj kaj ŝirmitaj per dika ruĝa tapiŝo. Apogrelo ne ekzistas kaj ne estas bezonata. En niĉoj staras gajaj amoretoj. Ne, ne estas eble.

La demando nur estas, kio estas tio?

Estas tre eleganta ŝtuparo. Ĝi donas impreson de riĉeco, solideco kaj sekureco. La klientaro suriras ĝin kun ĝuo, la kontoristoj kun timema respekto. Ĝi kondukas al la pleja sanktejo: la direkcia etaĝo.

Longa larĝa koridoro, dika tapiŝo, kiu kaptas la plej etan sonon de paŝo: sankta silento. Malantaŭ kvin brunaj pordoj regas same multaj direktoroj, ĉiu kun speciala funkcio. Ili estas treege altaj sinjoroj. Sed ne senmortaj. La plej alta ĉefo nomiĝas Marcus. Lin oni nomas AD

aŭ nur Marcus, sed neniam je rekta alparolo. Kiel poten-
cokolektivo la direkcia estas nomata "la dua etaĝo".

"La dua etaĝo ordonis, ke ...", "La dua etaĝo malpermesas, ke ...". Tutsame kiel "Downing Street diras" aŭ "Quay d'Orsay neas".

En la direkcia etaĝo troviĝas ankaŭ la sekretario. Ĝi gardas la plej profundajn sekretojn de la banko, ĝiaj kontoristoj havas absolute reteneman sintenon al la aliaj kontoristoj. La sekretoj de la sekretario estas konservataj en du ŝrankoj. La paperoj en unu estas stampitaj "Sekrete," en la alia "Tre sekrete".

Oni neniam povas esti sufiĉe atentema.

Plej longe for laŭ la koridoro troviĝas la estrara ĉambro. Ĝi estas granda kiel dancosalono, havas pargetan plankon kaj pezajn ĉizitajn meblojn el kverko. En la brile polurita longa tablo speguliĝas belega kristala lustro. En la estrara ĉambro troviĝas la biblioteko de la banko. Unu mallonga vando estas de la planko ĝis la plafono plena de libroj, kiuj estas konservataj malantaŭ vitro kaj ŝloso.

Nur du personoj havas aliron al ili. La kontoristo en la sekretario, kiu enmetas la librojn, kaj la purigistino, kiu unu fojon ĉiujare polvosuĉas ilin.

Ĉirkaŭ la vandoj pendas portretoj, veraj mane pentritaj artaĵoj. Rimarkindaj viroj rigardas suben. Ili ĉiuj ha-

vas ĝentilan rideton sur la lipoj kaj malvarmajn, durajn okulojn.

Ili ĉiuj okupis la prezidantan seĝon.

La ŝtuparo al la tria etaĝo ne estas eleganta, sed ĝi estas bela. Ĝi estas farita el simpla kalkŝtono. La tapiŝo, kiu estas io inter ornamo kaj taŭgo, ne sufiĉas por la tuta ŝtuparo, nur tiel longe kiel oni povas vidi de la dua etaĝo. En niĉo staras statuo. Oni ne povas vidi, kion ĝi reprezentas, sed oni divenas pri Merkurio. Ĉiukaze ne estas iu estrara prezidanto.

La tria etaĝo enhavas la antaŭkorton de la pleja sanktejo: la personarsekcion kun la personarĉefo. Kontisto Stenman estas potenca viro. Kiam regas senlaboreco, li estas diktatore dura, kiam mankas kontoristoj, li estas demokrate aminda.

Li estas konjunktura folio. Sed li tremas nur antaŭ direktoroj.

La reviziado kaj librotenado najbaras la personarsekcion. Oni tuj rekonas kontoristojn el la reviziado pro ilia lontaneca rigardo kaj malrapida irado.

La koridoro malhavas tapiŝon, kaj la ŝtuparo al la supra etaĝo mallarĝiĝas. Ĝi estas iom malbela kaj foruzita. Ĝi memorigas pri ŝtuparo en malnova etburĝa domo. Ĝi premas vin al la vando kaj igas vin sopiri pri pizosupo kaj varma punĉo. Ĝi kondukas al korespondado, en-

kovertigo kaj presejo. La enkovertigo en la mateno nomiĝas poŝtmalfermado.

La koridoro estas mallarĝa pasejo kun fuma plafono. La kontoristoj de la korespondado estas dividitaj en du grupoj, unu sveda kaj unu eksterlanda. Estas granda diferenco inter la du grupoj, estas tre distingite skribi "We credit you" anstataŭ "Vi krediterar Er".

Sed ambaŭ grupoj estas same ruĝaj en la vizaĝo je la fino de la ofica tempo. Estas peza laboro.

La lasta ŝtuparo fine estas tutsimple ŝtuparo. Ĝi vekas neniajn sentojn, ĝi nur plenumas utilan funkcion. Ĝi estas el simpla griza ŝtono kaj per tio rompas la naturleĝojn, ĉar ĉi tie la praroko kuŝas plej supre. Ĝi kondukas al stokejo, necesejoj, teraso, sociumejo kaj manĝejo. En la sociumejo estas unu gravuraĵo kaj unu triktrako kaj tablo kaj seĝoj por dekduo da personoj.

En la stokejo regas pedelo Jörgenson. Li estas alta viro kun revokuloj. Li estas artamanto, iom nervoza kaj tre afabla. Liaj negocoj povus esti pli bonaj. Liaj fenestroj direktiĝas al la strato kaj haveno kaj li havas mirindan elrigardon.

La laboro estas malpeza dum tri jarkvaronoj. Nur dum la dua kvarono, kiam la jarmendoj de la kontoroj alvenas, li havas multan prilaboron.

Cetere li povas trankvili. Li havas kvietan hobion: kolekti cigaretstumpojn kaj vicigi ilin sur la fenestro kaj ĵeti

ilin sur la tramojn sube sur la strato. Ne estas multaj la tramoj en la urbo, kiuj ne ĉirkaŭveturas kun la stumpoj de Jörgenson sur la tegmento.

Ili faras longajn vojaĝojn. Li mem iras nenien.

Nun vi scias multon pri la banko, kio ne kutimas troviĝi en iliaj jarraportoj.

Einar Åberg

Komenca ĉapitro el samtitola romano

El la sveda tradukis Franko Luin

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-173-9